


中國報通

EL POPOLA

CINIO





Infanoj kun tigrokapa ĉapo
sur la kapo
Foto de WU XINHUA





INTER NI

Dankon al niaj legantoj pro iliaj kritikoj kaj proponoj

Lastatempe ni danke ricevis multajn leterojn kaj enketilojn de niaj legantoj, en kiuj ili proponis al ni aldoni novajn temojn, ekzemple pri la vivo de ĉinaj arbohakistoj, sportaj ludoj de nacimalplimulto, verkoj de Konfuceo kaj surogataj fueloj. Tiuj proponoj estas tre bonaj, ni publikigos iom post iom la temojn en nia revuo.

En tiuj leteroj niaj legantoj nian revuon laŭdas kaj ankaŭ kritikis. Tio helpas al ni plibonigi nian revuon. Pro tio ni dankas ilin. Sube estas ekstraktoj de la leteroj.

S-ro Frédéric Rakotoarison diris: "Por mi, EPC estas mia nedisigebla amiko. Kiam mi estas tre laca post laboro, mi rigardas kelkajn bildojn de EPC, kaj sentas mian lacecon pli malpeza. Kiam mi ĉagreniĝas, kelkaj artikoloj bone legitaj sufiĉas por forigi la ĉagrenon." S-ino Joëlle Huet el Francio havas similan senton: "Ĉiu monato estas por mi ĝojo kiam mi legas EPC. Mi ĉiam trovas interesajn artikolojn, kiuj permesas al mi konatiĝi kun la ĉina vivo. Iom post iom, pentraĵoj, kaligrafaĵoj kaj artaĵoj kortuŝas min pli kaj pli."

S-ino Jeannine Vincent el Francio faris kritikon: "... ŝajnas al mi, ke de kelka tempo aperas pli da bildoj ol da artikoloj. Tio favoras la pigrulojn, kiuj ne ŝatas legi, sed ne la studemulojn, kiuj deziras progresi en Esperanto. Imagpovo certe ne mankas al la redaktoroj de EPC."

La Red.

Abeloj sur floroj
Foto de **WU XINHUA**

ENHAVO

- 16 Pri la loĝantaro kaj naskolimigo de Ĉinio (III)
- 6 Vojo al fruktodona laboro
- 22 **Malprofundaĵo de maro — ora zono**
- 40 Por interkompreno
- 13 **Seninfana maljunulo kaj la kvin generacioj de Peng-familio**
- 32 **Kajta festivalo kun nova aspekto**
- 18 Mirinda kap-akupunkturo
- 37 **EL ĈINAJ GAZETOJ**
- 27 Altira ĝenoserio pri antikva ĉefurbo
- 20 Dimanĉo en Daluo
- 49 **LOĜDOMOJ KAJ MOROJ:**
- Eleganta domo de baj-oj
- 10 Purpura domo
- 46 **MODERNAJ VESTOJ:**
- Someraĵ vestoj

44 Pacaj senditoj en Quanzhou (II)

54 **TRA LA MONDO:**

Kafejoj en Parizo

31 **AMUZOJ**

42 **KURANTAJ AFEROJ**

14 **HOMOJ NEFORGESEBLAJ (5):**

Jui Ĉunoŝin

48 **POR KOMENCANTOJ:**

Surdamuta knabo

26 **ESP-NOVAĴOJ**

4 **INTER NI**

30 Novaj libroj de ĈEE en 1990 (Daŭrigo)

2 Infanoj kun tigrokapa ĉapo sur la kapo

4 Abeloj sur floroj

47 Gubernio de ĉina akrobatiko

38 Gimnastoj en konkurso


SUR LA KOVRILO:

Flugigo de kajto

Foto de WU XINHUA


LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

- 1. Qinzhou (p. 22)
- 2. Weifang (p. 32)
- 3. Yuncheng (p. 18)
- 4. Nanĵiang-gubernio (p. 13)
- 5. Daluo (p. 20)
- 6. Dali (p. 49)



Vojo al fruktodona laboro

Teksto de DA WEI
Fotoj de LIU SIGONG




Produktolinio de videoaparatoj



Farado de vibriloj



Foto de PI DAWEI

Muntado







Artefarita kristalo eltirita el forno

Foto de PI DAWEI

Ekzamenado de ekipaĵoj de mikroonda transmisio



ANTAŬ dek jaroj ordinara ĉina familio tre ĝojis, se ĝi povis havi koloran televidilon.

Nun minimume 7-8 specoj da koloraj televidiloj estas vendataj en magazenoj de elektraj aparatoj en grandaj kaj mezgrandaj ĉinaj urboj. Laŭ statistiko, ĉ. duono de la familioj en la ĉinaj urboj posedas koloran televidilon. Multaj personoj turnis sian rigardon eĉ al avangarda kolora televidilo pli bela kaj pli bonfunkcia, ekz. kolora televidilo grandekrana, ebensurfaca, rektangula kaj teleregata. Pli kaj pli multe da luksaj elektraj aparatoj, kiaj videoaparato kaj magnetofonokomplekso, eniris en ordinarajn familiojn.

INDUSTRIO DE KOLORA TELEVIDILO ANTAŬIRANTA

Tia evidenta ŝanĝiĝo en la materiala kaj kultura vivo de la popolo rezultis el la rapida disvolviĝo de la ĉina elektronika industrio. Lastatempe mi informiĝis de la Ministerio de Maŝin-elektronika Industrio de Ĉinio, ke en la pasintaj dekelkaj jaroj kreskis sesoble la totala produktovalorado de la ĉina elektronika industrio. Rilate kolorajn televidilojn, ilia jara produktokvanto antaŭe estis nur kelkmil, sed nun jam pli ol 10 milionoj. Enkalkulante la nombron de nigra-blankaj televidiloj, oni liveris al la socio sume 142 milionojn.

Jam en la 70-aj jaroj Ĉinio povis produkti tutan koloran televidilon el ĉinaj pecoj, inkluzive de kolora bildotubo. Sed pro la tiamaj postgintaj produktorimedoj kaj malalta nivelo de tekniko de farado de diversaj televidilaj pecoj, precipe de koloraj bildotuboj, la provproduktitaj koloraj televidiloj ne estis bonkvalitaj kaj oni ne povis amasprodukti. La disvolviĝo de la industrio de kolora televidilo estis malrapida.

Je mencio pri tio Zhang Xuedong, vicministro de la Ministerio de la Maŝin-elektronika Industrio, diris, ke kun senĉesa pliboniĝo de la popola vivo ĉiam kreskas la be-



Kunigo de dratoj de elsendilo

zono pri koloraj televidiloj. Por kontentigi la bezonon de la merkato, lerni alilandajn teknikojn pri koloraj televidiloj kaj disvolvi la industrion de kolora televidilo de sia lando, niaj elektronikaj entreprenoj elektis novan vojon preni importon de alilandaj avangardaj teknikoj kiel startpunkton kaj kuratingi la avangardan nivelon per ellerno de tiuj teknikoj. Aprile de 1980 la unua importita produktolinio de kolora televidilo estis fine muntita kaj komencis funkcii en Tianjin. En la sekvaj jaroj Ĉinio importis pli ol 60 produktoliniojn de kolora televidilo, ekhavis kompare grandan muntokapablon kaj ricevis rimarkindan profiton kaj bonan socian efikon. Nun la produktovalorado de koloraj televidiloj de Ĉinio jam okupas la unuan lokon en la elektronikaj entreprenoj.

MONO PAGINDA

La prospera produktado de koloraj televidiloj antaŭenpuŝis la disvolviĝon de la elektronika industrio. Laŭ informo de la Ministerio de Maŝin-elektronika Industrio, en la pasintaj dek jaroj la ĉinaj elektronikaj entreprenoj importis pli ol 2 000 alilandajn avangardajn produktometodojn per 3 miliardoj da usonaj dolaroj kaj investis 18 miliardojn da juanoj por interna teknika reformado. Ĉu tiom da mono estas paginda?


S-ro Zhang Xuedong klarigis, ke la grandskala importado de alilandaj avangardaj teknikoj ebligis al

duono de la elektronikaj entreprenoj de la lando fari reformadon en malsamaj gradoj. La altiĝo de teknika nivelo multe levis la produktokvanton kaj kvaliton kaj ŝanĝis specojn de la produktaĵoj. La Unua Radio-fabrika de Ŝanhajo estas granda entrepreno produktanta elektronikajn pecojn. La produkta kaj administra nivelo de tiu fabriko atingis la normon aprobitan de la Internacia Elektroteknika Komisiono pro importado de 9 produktolinioj, kiel tiuj de karbon-tega rezistilo, metal-tega rezistilo kaj ceramika filtrilo, kun 80-jara internacia nivelo.

Krome, la jara produktokvanto de la industrio de integrita cirkvito en Ĉinio kiel bazo de alta tekniko jam atingis 110 milionojn da pecoj, 2.3-oble pli multe ol tiu antaŭ dek jaroj. En la komputila industrio rigardata kiel motoro por prosperiĝo de la moderna ekonomio Ĉinio fondis industrion de mikrokomputilo kaj malgranda komputilo. Ankaŭ multe progresis teknika importado de trafikiloj, telekomunikiloj, elsenda kaj riceva ekipaĵoj de radio kaj televizio. Oni povas diri, ke jam fundamente formiĝis la sistemo de kompleta elektronika industrio kun abundaj specoj, kiel kolora bildotubo, integrita cirkvito kaj elektronikaj pecoj, instrumentoj kaj ekipaĵoj, avangardaj rimejoj kaj alta kvalito de produktaĵoj.

MEMDISVOLVA KAPABLO

Oni ne povas vere disvolvi la



En laborejo de kurtondaj radioelsendiloj

Ĉinan elektronikan industrion, se oni dependas nur de importado de tekniko.

Oficisto pri ĝenerala planizado de la Ministerio de Maŝin-elektronika Industrio diris al mi, ke grave estas, ke oni devas asimili la importitan teknikon, por ke ĝi servu al ĉina produktado kaj estigu memdisvolvan kapablon de Ĉinio. Li aldonis, ke troviĝas jenaj paŝoj por efektivigi la supre diritan: Ŝanĝo de elektronikaj pecoj, fabrikado de ĉinaj aparatoj kaj ĉina produkta sistemo. Kvankam ili nun ankoraŭ ne estis perfektaj, tamen en la lastaj dek jaroj la ĉina elektronika industrio havis pli ol 5 000 novajn fruktojn — produktaĵojn fabrikitaĵojn de Ĉinio mem, el kiuj pli ol 1 100 atingis la internacian avangardan nivelon de la 80-aj jaroj, ekz. komputilo por lasera ĉinlingva traktado, superklasa mikrokomputilo Taiji-2230 kaj telekomunikacia sistemo por satelito.

Kiam mi vizitis la Pekinan Fabrikon de Radioaparatoj, kiu produktas ĉefe radio- kaj televidelsendajn ekipaĵojn, s-ro Sun Cai, altklasa inĝeniero kaj fabrikestro, fiere diris, ke ekipaĵo de mikroonda transmisio de kolora televido estas produktaĵo plej sukcese farita surbaze de importado de tekniko en la lastaj jaroj por efektivigi ĉinan produktadon. En 1983 la fabriko importis ekipaĵojn de mikroonda transmisio de kolora televido de tipo 500 fabrikitaĵojn de la Japana Elektra Kompanio. La fabriko far-

is ĉiuf flankan ekzamenon kaj partan analizon pri la ekipaĵo, poste ekproduktis aparato-eksteraĵojn, ondosistemon kaj mezfrekvencan regulilon kaj tiel efektivigis produktadon parte de Ĉinio. En 1988 ĝi efektivigis produktadon plejparte de Ĉinio, escepte de mikroonda altfrekvenca aranĝaĵo. En 1990 ĝi sukcese produktis mikroondajn altfrekvencajn aranĝaĵojn kaj efektivigis, ke ekipaĵo de mikroonda transmisio de kolora televido estas produktita tute de Ĉinio. Nun ĝia provfarita tia ekipaĵo estas uzata de la Ĉina Centra Televida Stacio. Ankaŭ multaj provincoj kaj municipoj jam uzas aŭ mendas tian ekipaĵon.

Fabrikestro Sun diris al mi, ke en la lastaj jaroj la fabriko vendis al klientoj milojn da televidelsendajn ekipaĵojn. La nombro konsistas 80% de tiu de la lando kaj la jara produktokvanto de radio- kaj televidelsendajn ekipaĵojn jam okupas la trian lokon en la mondo.


SIN TURNI AL EKSPORTO

La ĉinaj elektronikaj entreprenoj unue importis teknikon kaj ekipaĵojn, poste senĉese evoluis kaj nun jam komencis eksporti kompletajn ekipaĵojn.

Mi informiĝis, ke pro eksportado de siaj elektronikaj produktaĵoj Ĉinio enspezis en 1980 10 milionojn da usonaj dolaroj kaj en 1990 jam pli ol 4 miliardojn da usonaj dolaroj. Komence ĝi eksportis nur elektronikajn pecojn kaj nun jam kompletajn aparatojn. Ekz. la Pekina Televidila Fabriko, fama pro siaj koloraj televidiloj kun marko "Peonio", kreis 33 novajn specojn kaj eksportis pli ol 250 000 kolorajn televidilojn al Germanio, Singapuro, Aŭstralio kaj aliaj landoj.

Des pli ĝojige estas, ke produktolinio de artefarita kristalo eksportata de la Pekina Radioaparata Fabriko Chenxing al Orienta Eŭropo donis ekzemplon, ke la elektronikaj entreprenoj de Ĉinio eksportas kompletajn teknikajn ekipaĵojn. En la fabriko mi vidis artefaritan kristalon ĵus eltiritan. Stangoj da travidebla kristalo estis eltiritaj el la fornoj kaj lume brilis. Mi informiĝis ankaŭ, ke la fabriko servigas la artefaritan kristalon kiel materialo por kristala vibrilo de kolora televidilo, mikrokomputilo kaj movebla telekomunikilo. Tia kristalo estas vaste uzata en nacia defendo, scienca esplorado, radio-komunikado kaj popola vivo. Nun la fabriko jam fariĝis elektronika entreprenoj produktanta ĉefe eksportaĵojn. ■

Solvo por
"Tranĉi
Kukon"



Purpura domo

Teksto kaj fotoj de WEI LIAO






Al la geedziĝa ceremonio

Novgeedzoj



Kapto de la sceno





Kiso

Parencoj kaj amikoj gratulas la novgeedzojn.





Vualo de novedzino

AKOMPANATE de la melodio de nupta marŝo, 25-jara He Yiwen, en blanka nupta vualo, alvenis brako en brako kun sia edzo, kaj kun bukedo en mano. Belaj "anĝeloj" disŝutis petalojn sub iliajn piedojn. La parencoj kaj amikoj disŝutis al la novaj geedzoj kolorpaperajn pecetojn por ilin gratuli. En tiu sankta tempo la novedzino emociiĝis ĝis larmoj, apogante la kapon sur la ŝultro de la edzo.

La scenon mi vidis en la Purpura Domo sidanta proksime de la plej movoplena komerca strato Wangfujing en Pekino, kiu donas specialan servon al geedziĝantoj.

La tuta nupto estis zorgeme aranĝita. La nupta prezidanto deklaris per dolĉa baritono la komencon de la ceremonio. La nupto-atestanto solene voĉlegis la geedziĝajn atestilojn kaj donis ilin al la novgeedzoj.

La ĵuro estis la apogeo de la ceremonio. La novgeedzoj, metinte sian manon sur la atestilon, deklaris unu post la alia: "Mi volantas kuniĝi kun vi per edzeco, mi akceptas vin kiel mian edzinon (edzon), mi amos vin por ĉiam, ĉiam estos ĉe vi, kaj dividos kun vi kaj

feliĉon kaj malfeliĉon. Ĵuras..." Kia solena kaj sankta sceno!

Post tio la novaj geedzoj prezentis al siaj gepatroj bukedojn en signo de danko pro ilia flegado kaj edukado. Poste la geedzoj reciprokis sian memorigaĵon kaj interkisis antaŭ la gastoj.

Fine, la direktoro de la Purpura Domo donacis al la novaj geedzoj spegulon kun signifo de harmonia feliĉa vivo.

Vidinte la solenan kaj noblecan nuptan ceremonion, iu mezaĝulo diris envie: "Kiel mi volus geedziĝi kun mia edzino refoje!" Kaj iu junulo faris demandadon pri mendo kaj pago de nupta ceremonio.

Post la geedziĝa ceremonio He Yiwen diris al mi: "Mi ne atendis, ke la ceremonio estas tiel sukcesa. Mi sentas, ke mi estas la plej feliĉa en la mondo."

Direktoro Zha Jiqi de la Purpura Domo prezentis al mi la procezon de la funkciigo de la firmao. "Purpura Domo" estas malnova firmao. Ĝi estis starigita de Yu Chichang en 1934. Por la ĉinoj purpura koloro simbolas noblecon, tial la firmao nomiĝis "Pur-

pura Domo". Siatempe ĝi estis tre fama en Pekino, ke ĝi reformis la malnovajn geedziĝajn morojn kaj proponis novtipan ceremonion. En 1952 la firmao ĉesis funkcii.

Tiutempe plejparto de la ĉinoj vivis ne riĉe, kaj la geedziĝo estis tre malluksa. Parencoj kaj amikoj kunsidis en la ĉambro de novgeedzoj simple meblita, kaj la novgeedzoj regalis ilin per bombonoj. La moro daŭris sufiĉe longe.

En la lastaj jaroj pliboniĝis la vivo de la popolo kaj estas nature, ke iuj volas fari sian geedziĝon pli luksa, eĉ aperis tendenco konkuri en lukseco de nupto. Pekino ne estas la plej altkonsuma urbo rilate geedziĝon, tamen, ĉiu paro da novgeedzoj meznombro elspezas ĉ. 10000 juanojn. Tio ne estas malgranda sumo por nunaj ĉinoj. La ĝranda elspezo por geedziĝo sufokas la junulojn, kiuj malmulte enspezas. Ili vokis al la socio reformi geedziĝajn morojn.

Kiel fari geedziĝan feston nemulte elspeza, sed gaja, nobleca kaj konforma al la postuloj de la nuntempaj junuloj?

Zha Jiqi, iama laboranto de la malnova Purpura Domo, subite estis kaptita de ideo refunkciigi la Purpuran Domon, kiu donas servojn de luigo de geedziĝaj kostumoj kaj ornamaĵoj kaj aranĝo de nupta ceremonio. Kaj tiel refunkciis la Purpura Domo la 1-an de junio de la pasinta jaro.

La Purpura Domo estas bonevena al la junuloj. En unu jaro de la 1-a de junio 1990 ĝis la 2-a de junio 1991, ĝi jam akceptis pli ol mil konsultantojn kaj aranĝis nupton por pli ol 200 paroj da geedzoj. Iuj elmigrintaj ĉinoj, kiuj havis sian nupton en la malnova la Purpura Domo antaŭ dekoj da jaroj, plezure rekomendis al siaj infanoj la domon, kiam ili aŭdis, ke la Purpura Domo refunkciis. Nun ĝi jam akceptis 20 parojn da novgeedzoj transmarajn.

Krome, la domo ankaŭ servas al maljunaj geedzoj por ilia ora aŭ argenta geedziĝo. La Purpura Domo estas intima ne nur por junuloj, sed ankaŭ por maljunuloj. ■

Seninfana maljunulo kaj la kvin generacioj de Peng-familio

LA vilaĝo Shuangliu de Nanjiang-gubernio, Sichuan-provinco, Ĉinio, estas ĉirkaŭita de altaj montoj. Tie torentas riveroj, maloportunas trafiko kaj malfekundas kampoj. Vere povra loko ĝi estas. Pro malmulta enspezo, la vilaĝanoj vivas neriĉan vivon. Malgraŭ tio, kamparano Peng Zhongli kaj liaj familianoj volonte vivtenas la 117-jaran seninfanan maljunulon Luo Dabao.

En la komenco de la 30-aj jaroj, Luo Dabao havis sian propran familion, sed pro milito kaj natura katastrofo lia patro mortis de malsano. Forlasis lin lia edzino. Mortis ankaŭ lia frato, kies edzino edziniĝis al alia viro iom poste. Sola, li longe migris kaj fine venis al la vilaĝo Shuangliu kaj loĝis najbare al malriĉa kamparano Peng Zongyi. Turmentata de malsato, malvarmo kaj malsano, la ĉirkaŭ-60-jara Luo Dabao falis en malesperon. Tiam li nur deziris fini sian mizeran vivon.

En tiu kriza momento Peng Zongyi etendis al li amikajn manojn kaj venigis kuraciston por li de 15 km. for. Sciante, ke ankaŭ Peng estas malriĉa, li rifuzis la kuracadon por ne pliigi ŝarĝon de sia najbaro. Je tio, Peng Zongyi diris al li: "Vi ne havas familion. Prenu min kiel vian fraton. En la estonteco ankaŭ miaj filoj kaj nepoj prizorgos vin same kiel min." En la sekvantaj pli ol 20 tagoj, Peng Zongyi manĝigis al li nutra-

jojn kaj medikamenton. Post kiam Luo resaniĝis, Peng Zongyi venigis lin en sian hejmon, kaj de tiam Luo fariĝis membro de la familio Peng.

Pasis 3 jaroj kaj Peng Zongyi grave malsaniĝis. Antaŭ sia forpaso, li venigis sian filon Peng Mingyun antaŭ sian liton kaj testamentis: "Luo Dabao ne havas filon nek filinon. Mi konfidas lin al vi. Nepre vivtenu lin ĝis lia morto." Tion dirinte, li forlasis la mondon.

Preninte sur sin la ŝarĝon de vivtenado de Luo, Peng Mingyun atenteme prizorgis lin. Vivante malriĉe kaj ŝpareme per farmado, Peng kaj liaj 6 familianoj ĉiam cedis bongustajn kaj nutroriĉajn manĝaĵojn al Luo. En la tumultaj jaroj la hejmo de Peng estis ofte prirabita de banditoj, tial Peng Mingyun ofte prunteprenis grenon, por ke la maljunulo ne suferu de malsato.

Post fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, la registaro dediĉis grandan atenton al la vivo de la mizeraj kamparanoj. Ankaŭ Luo ricevis agron. Por ne plu ĝeni la familion de Peng li decidis vivi sola. Malgraŭ ke Peng Mingyun ĉiamaniere persvadis lin resti en lia hejmo, li rifuzis kun dankemo. Peng do devigite konsentis. Post tio Peng, same kiel antaŭe, ofte helpis al la maljunulo kulturati la teron, haki brullignojn, transporti akvon, aĉeti ĉiutagajn bezonaĵojn ktp. Malfeliĉe, bovo grave vundis

al la 86-jara Luo Dabao piedon. Informiĝinte pri tio, Peng Mingyun transiris neĝkovritan monton kaj venigis kuraciston de malproksime por kuraci lin. Kvankam la vundo estis resanigita, tamen la maljunulo perdis la kapablon vivi sola. Peng Mingyun denove venigis la maljunulon en sian hejmon. Tiam ankaŭ Peng Mingyun maljuniĝis kaj li komisiis la vivtenadon de Luo al sia filo Peng Shixun.

Peng Shixun estas saĝa, kapabla kaj fortika. En 1960, la tiea prospektortrupo volis dungi lin je favoraj kondiĉoj. Por Peng Shixun tio estis bona ŝanco sin liberigi de malriĉeco. Sed li rifuzis por prizorgi avon Luo. Tiam la loko estis trafita de natura katastrofo, al Peng mankis greno. Por aĉeti al Luo nutraĵojn, Peng Shixun ofte iris aliloken kaj laboris kiel taglaboristo. Tiam liaj familianoj foje devis sin satigi per manĝeblaj herboj. En 1964 la prospektortrupo volis dungi lin refoje kaj ankaŭ ĉifoje li rifuzis, dirante: "Kiam vivas avo Luo, mi ne foriras!"

Tempo pasis kiel rapida fluo. Ankaŭ Peng Shixun havis filon, kiu nomiĝas Peng Zhongli. Jam en sia infaneco, Peng Zhongli ekamis la maljunulon Luo. Ili kune ludis tage kaj kune dormis nokte. Inluite de siaj praavo, avo kaj patro, ankaŭ Peng Zhongli estas helpema.

En 1984, Peng Zhongli edziĝis.

Konsiderante, ke la familio kun 9 membroj estas tro granda por mastrumado Peng Shixun decidis, ke la junaj geedzoj vivu aparte. Peng Zhongli petis, ke li vivu kune kun Luo. Kiam li diris tion al sia edzino Lin Dengxiu, ŝi longe silentis, pensante, ke ili ĵus geedziĝis kaj ne havas sufiĉe da greno kaj mono. Kaj krome ili devas ripari la domon kaj aĉeti meblojn, pro kio ili bezonas multe da mono, kaj cetere, ŝi havis plurajn fratinojn kaj siaj malsanaj gepatroj bezonas laborforton kaj monhelpon. En tiu situacio estas vere malfacile por ili vivteni la maljunulon en la ĵus starigita familio. Ŝi timis ankaŭ, ke najbaroj mokos ilin, se ili ne bone prizorgos la maljunulon. Kompreninte sian edzinon, Peng Zhongli persvadis ŝin: "Ni certe venkos niajn proprajn malfacilojn, ni ankaŭ devas helpi viajn gepatrojn kaj bone prizorgi praavon Luo." Finfine lia edzino kapjesis.

Peng Zhongli kaj lia edzino preparis ĉambron por Luo, kalkis ĝin kaj aĉetis por li novajn liton, litajojn kaj kulvualon. Post kiam ĉio estis preta, ili ĝojoplene transportis la maljunulon Luo en la novan ĉambron. Same kiel siaj antaŭuloj, la junaj geedzoj bone prizorgas la maljunulon. Lin

Dengxiu ofte lavas vestojn por li kaj Peng Zhongli de tempo al tempo banas lin, lavas al li la vizaĝon, piedojn kaj tondas ungojn por li. En vintro la geedzoj aŭ hakas brullignojn sur montoj aŭ aĉetas karbon de malproksime por hejti la ĉambron de Luo. Ellerninte ŝton-tajladon, en morta sezono de kamplaboro Peng Zhongli iras aliloken labori por pliigi sian enspezon kaj aĉeti al la maljunulo viandon, ovojn, sukeron, teon, cigaredojn, vinon k.a. La junaj geedzoj mole kuiras manĝaĵojn, ĉar la dentoj de la maljunulo ne bone funkcias. Vintre la maljunulo enlitiĝas frue kaj ellitiĝas malfrue, Lin Dengxiu do ĉiutage portas manĝaĵojn antaŭ lian liton. En la pasinta jaro, Luo festis sian 117-jaran naskiĝtagon. Por bone zorgi la grandaĝulon nun, Peng Zhongli ne plu iras aliloken por labori. Por pliigi la enspezon li ekfunkciigis infanĝardenon en sia propra hejmo. Li aĉetis ankaŭ televidilon por la maljunulo.

Por distri la maljunulon, Peng Zhongli lasis sian 6-jaran filon Peng Yong prezenti al Luo teon, manĝaĵon, bruligi por li cigaredon kaj kune kun li ludi. Samtempe Peng Zhongli inokulas en la animo de sia filo respekton al maljunuloj. Ĝis nun Luo Dabao vivis

59 jarojn kune kun la 5 generacioj de Peng.

Krom la familio Peng, la loka registaro bone zorgas pri Luo, donante al li certan monhelpon ĉiumonate kaj pli ol 70 ŝtatoficistoj vizitis lin. Gubernia gvidanto s-ro Yang Qingyong plurfoje vizitis lin donacante al li ladmanĝojn, sukeron, cigaredojn, vinojn k.a., veturinte 100 km. kaj piedirinte pli ol 10 km. Trovinte, ke la ĉambro de Luo estis ne bone prilumata de sunlumo, s-ro Yang asignis sumon por rekonstrui la domon por la maljunulo. En la pasinta aŭtuno s-ro Yang speciale aĉetis por li fonoforon. Kiam li metis ĝin en la orelojn de la maljunulo, ŝaltis ĝin kaj reguligis la volumenon de sono, la maljunulo ekĝojis, dirante: "Mi aŭdas. Nun mi aŭdas!" Dank' al la atentema prizorgo de la registaro kaj la tuta familio de Peng Zhongli, la maljunulo vivas feliĉe kaj sane.

En la vilaĝo, kie loĝas Peng Zhongli, ĉiuj laŭdas la noblan familion de Peng. Kiam iliaj bonfaroj diskonigis, raportistoj venis de tre malproksime por intervjuo. La loka registaro alvokis al la popolo de la gubernio respekti kaj prizorgi maljunulojn, kun la familio de Peng Zhongli kiel ekzemplo. ■

KARAJ GESINJOROJ!

Vizitu unu el plej interesaj de Rusio VOLGOGRAD (estinta STALINGRAD)!

Ni rekomendas al Vi ĝui etoson de nia socio kaj plurajn vidindaĵojn de nia urbo. Plejbonas vizito 5-7-taga vintre, 7-9 — somere.

Kontraŭ 80 usonaj dolaroj tage Vi havos:

loĝejon, manĝadon, aŭton kun stiristo, ĉiĉeronon, tradukiston.

Rifuzante ion, Vi ricevos parton da mono. Ekzemple, se Vi posedas Esperanton aŭ la rusan (do, ne bezonas tradukiston),

konsentas loĝi en soveta familio kaj manĝi tion, kion manĝas la familio, rifuzas de la aŭto — tiam Vi devas pagi nur 20\$ tage.

2-persona grupo havos la samon kontraŭ 35-120\$. 3-persona — kontraŭ 50-150\$.

Monata antaŭpago donas 10%-rabaton. Infanon ne pli 5-jaran eblas kunpreni senpage.

Aleksandr Konstantinoviĉ Kotelnikov (n,pn,fn).

USSR, 400015, VOLGOGRAD, Koroljova-str., 9-19.

Hejma tn: (844)-71-66-39, Esperanto aŭ la rusa.

Skribe — ankaŭ angle, france, germane.

BONVENON! E-klubo 'VEGA'.

Jui Ĉunoŝin

de CHEN YUAN

LA 14-an de decembro 1956 mi vizitis japanan esperantiston Jui Ĉunoŝin en Xinqiao-hotelo. Tiam li gastis en Pekino. Li estis honesta kaj neesprimigema. Nur post dek jaroj mi eksciis, ke li havis koron ardan, koron amantan la homaron kaj la malfortajn subprematojn. Nun mi memoras nur liajn vortojn: Parolu malrapide! Li parolis Esperante milde kaj malrapide, sed kun firma tono.

En la 11-a de novembro 1967, 11 jarojn post nia renkontiĝo, Jui Ĉunoŝin brulmortigis sin en Tokio por protesti kontraŭ la japana registaro, ke ĝi subtenis Usonon en ĝia agreso al Vjetnamio. Lia ago forte skuis la japanan popolon, kompreneble ankaŭ la japanajn esperantistojn.

En la 1-a de januaro de la sekvanta jaro veterana japana literaturisto Doki Zenmaro profunde respektata de progresema publikigis en "Asahi Shimbun" jenan poemon omaĝe al la Novjara Tago:

*Elirante el sia domo
nur tiel libere senzorge li agis
ke eĉ sanga parenco plej intima
neniel neniom ion imagis
pri lia firma decido en fundo anima.*

*Tiel severe kaj tiel kviete
estas elskribita la testamento;
kaj tion portante li transpaŝis
la vojon de Abismo de kriza momento.*

*Trans oceanojn, tra l' aer'
sendante grandajn armeojn,*

*la agresantoj sangavidas.
Sed ĉiam ĉie nur pereojn
proprajn ili vidas.*

La poemo estas entuziasma kaj plena, de malĝojo kaj indigno. Ĝi vidigis la voĉon de Doki kaj ankaŭ tiun de aliaj bonkoraj japanaj maljunuloj. Mi jam tradukis lian poemon en la ĉinan lingvon.

Doki, kultura batalanto obstina, firmvola kaj senlace batalanta dum la tuta vivo kontraŭ malbono, vizitis Ĉinion en marto 1973, estrante la japanan kulturan delegacion, en kiu estis aktiva esperantisto Tokuda Rokuro. Dum la vizito Doki diskutis kun Hujucz¹ kaj Ĵelezo² pri kontaktiĝo inter esperantistoj de Japanio kaj Ĉinio. Kaj poste en aŭgusto de la sama jaro delegacio de ĉinaj esperantistoj estrata de Ĵelezo vizitis Japanion. Mi³ kaj Zhu Mingyi⁴ estis ĝiaj membroj. Doki akceptis nin en malvasta kabineto de la Japana Asocio de Kultura Interŝanĝo kun Ĉinio. Tiam li estis 80-jara. Ĝuste tiam mi ricevis lian supran poemon en la japana lingvo kaj poste ĝian Esperantan tradukon. ■

1. Hujucz tiam estis prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo.

2. Ĵelezo tiam estis vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo.

3. La aŭtoro tiam estis ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo.

4. Zhu Mingyi estas laboranto de la Ĉina Esperanto-Ligo.

Pri la loĝantaro kaj naskolimigo de Ĉinio (III)

de ZHANG LEI

RIMARKINDAJ SUKCESOJ DE NASKOLIMIGO

Ĉinio ekpraktikis naskolimigon en la landa skalo jam en la mezo de la 70-aj jaroj. Pro ekonomiaj kaj tradiciaj kulturaj kaj ideologiaj kaŭzoj tiu ĉi laboro iris malsame en diferencaj lokoj, kiaj kamparo kaj urboj. Tamen kun profundigo de tiu ĉi fundamenta nacia politiko la laboro estas aprobata de la tuta popolo kaj rikoltis rimarkindajn sukcesojn en la pasintaj pli ol 10 jaroj.

Unue la rapida kresko de la loĝantaro estis bremsita. En la 60-aj jaroj la naskokvanto de la ĉina lo-

ĝantaro estis 3.362%, sed en la 80-aj jaroj 1.973%, dume la elcentoj de la loĝantara kresko malkreskis de 2.242% al 1.321%. En la 50-aj jaroj la ĉinaj virinoj naskis meznombre po 5.87 infanojn dum la tuta vivo, en la 60-aj jaroj 5.68, en la 70-aj jaroj 4.01 kaj en la 80-aj jaroj 2.42. La naskokvanto malkreskis je 57.4% en la 80-aj jaroj kompare kun tiu en la 60-aj jaroj. Se oni kalkulas laŭ la naskokvanto de la 70-aj jaroj, nun Ĉinio devas havi 1.3 miliardojn da loĝantoj, sed ne 1.143 miliardojn.

En la pasintaj 20 jaroj en Ĉinio la nombro de la naskitoj reduktiĝis je 200 milionoj, kio multe malpliig-

is la ŝarĝon alportitan de la tro multa naskado al la socia kaj ekonomia disvolvigo de Ĉinio kaj ludis gravan rolon por pliigi la ŝtatajn fortojn kaj plialtigi loĝantaran kvaliton.

La naskokvanto kaj loĝantara kresko de Ĉinio havas grandan influon sur la tutmondan loĝantaron. Kiam la naskokvanto kaj elcentoj de la loĝantara kresko de Ĉinio reduktiĝas je 1%, la koncernaj normoj de la monda loĝantaro do reduktiĝas je 2%, tial la naskolimigo praktikata de Ĉinio en la pasintaj 20 jaroj ludis pozitivan rolon por stabiligi la nombron de la loĝantoj de Azio kaj tiun de la tuta mondo.

Konsultiĝo pri naskolimigo



Krome, la malrapidigo de kresko de la naskokvanto de Ĉinio estas edifo al la disvolvigantaj landoj. Ĝi atestas, ke la malrapidigo de la naskokvanto estas ebla eĉ en la ekonomie subevoluintaj landoj, se oni alte taksas la naskolimigon.

Due, la kvalito de la ĉina loĝantaro rimarkinde leviĝis. Antaŭ la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko la meznombra vivdaŭro de la ĉinoj estis nur 35 jaroj, sed en la 80-aj jaroj ĝi estis 69.5 jaroj, interalie, la viroj meznombre vivis 67.3 jarojn kaj virinoj 70.65 jarojn. Rimarkinde reduktiĝis ankaŭ la mortokvantoj de la loĝantoj, beboj kaj novnaskitoj. Antaŭ 1949 la mortokvanto de la ĉinoj estis 2.5% kaj en la 80-aj jaroj ĝi reduktiĝis al 0.7%. Antaŭ 1949 la mortokvanto de la beboj estis 20.36%, sed en la 80-aj jaroj ĝi falis al 3.828%. La mortokvanto de la novnaskitoj antaŭ 1949 estis 9.255%, sed en la 80-aj jaroj ĝi estis 2.24%.

Trie, la koncepto de la ĉina popolo pri la geedziĝo kaj nasko de rimarkinde ŝanĝiĝis. Nun la ĉinoj preferas malfruan geedziĝon, malfruan naskon, malmultan naskon kaj eŭgenikismon. La elcentoj de la unuafoje edziniĝintaj malpli-ol-18-jaraj virinoj en la totala nombro de la unuafoje edziniĝintaj ĉininoj estis 48.3% en 1950 kaj 5.2% en 1980. La elcentoj malleviĝis je 89%, kaj en la urboj ĝi malleviĝis pli multe. La meznombra aĝo de la unuafoje edziniĝintaj virinoj estis 22.39-jara en la 80-aj jaroj. La nombro de solinfanoj konsistigis 20.73% de la novnaskitoj en 1970, sed 51.9% en 1989. La naskipovaj geedzoj plejparte konscie praktikas antikoncipadon kaj en la tuta lando 35 milionoj da naskipovaj geedzaj paroj promesis ne naski la duan infanon.

Dank' al peniga laboro dum dekoj da jaroj Ĉinio ne nur akiris la supre menciitajn sukcesojn, sed ankaŭ trovis vojon de naskolimigo kun ĉinaj trajtoj. Ĝi estas rekonita de la internacia socio kiel unu el la landoj, kiuj plej efike bremsis la loĝantan kreskon. Statistiko de UN montris, ke juĝate laŭ ĉefaj normoj pri loĝantoj, Ĉinio jam su-

peris la meznombrian nivelon de granda parto de la disvolvigantaj landoj kaj estas proksima al la nivelo de la evoluintaj landoj.

SEVERA LOĜANTARA SITUACIO

Ĉinio akiris rimarkindajn sukcesojn en limigo de la loĝantara kresko, tamen ĝia nuna loĝantara situacio estas ankoraŭ severa kaj pro tio la tasko de naskolimigo estas malfacila.

En la fino de 1990 la nombro de la loĝantoj sur la ĉeftero de Ĉinio jam atingis 1.143 miliardojn, kaj en la 90-aj jaroj Ĉinio troviĝas en la periodo de multega naskado kaj en la unua duono de la 90-aj jaroj ĝi troviĝas en la kulmino de naskado. La nombro de la naskipovaj virinoj (16-49-jaraj), tiu de la naskemaj virinoj (20-29-jaraj) kaj tiu de la virinoj (23-jaraj), plej taŭgaj por naskado, de la tuta lando en la unua duono de la 90-aj jaroj kreskos je 5.5%, 16.2% kaj 8.2% respektive kompare kun tiuj en la dua duono de la 80-aj jaroj. La nombro de la 20-29-jaraj kaj 23-jaraj virinoj reduktiĝos nur post 1996. Nun la totala mortokvanto de la loĝantoj de Ĉinio estas malpli granda ol tiu de la evoluintaj landoj. Juĝate laŭ la cirkonstancoj de la tuta lando, la mortokvanto ne multe ŝanĝiĝos en la proksima estonteco, tial en la unua duono de la 90-aj jaroj la nombro de loĝantoj en Ĉinio pliiĝos ĉiujare 17 milionoj.

Kiom da beboj naskiĝas en Ĉinio ĉiujare, tion decidas ĉefe la nombro de la naskipovaj virinoj, kiu formiĝas en la historio. En 1970-1990 la naskonivelo de la ĉinaj virinoj spertis du periodojn: En la 70-aj jaroj ĝi rapide malleviĝas de la alta nivelo al la malalta. Tiam la nombro de la infanoj naskitaj de ĉiu ĉina virino malleviĝis de 5-6 al 2-3. Ĝi ondis en la 80-aj jaroj sur kompare malalta nivelo kaj malleviĝis malrapide. Tiu fenomeno estas regula por la homa naskado. La historio de la loĝantara kresko de multaj landoj montris, ke kiam ĉiu geedza paro volas havi nur 2.1 infanojn, la plua malleviĝo de naskokvanto es-

tas malfacila. Ja estas rimarkinda sukceso, ke en 1970 ĉiu virino volis havi 5.8 infanojn, sed nun 2.3. Tamen la daŭra malleviĝo de naskokvanto ja estos malfacila.

Krome, la praktiko de la naskolimigo iras ne egale en malsamaj lokoj de Ĉinio. El la 30 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de la ĉeftero de Ĉinio estas 13, kies naskokvanto estas malpli ol 2.106%, la meznombra naskokvanto de la tuta lando, kaj 17, kies naskokvanto estas pli alta ol la meznombra, i.a. troviĝas 8, kies naskokvanto estas pli alta ol 2.4%. La donitaĵoj de la 4-a tutlanda censo montras, ke la natura kresko de loĝantaro estas malalta en la regionoj, kie bone disvolviĝas la ekonomio kaj estas malmultaj analfabetoj kaj duonanalfabetoj, tiu estas alta en la regionoj, kie malbone disvolviĝas la ekonomio kaj estas grandnombraj analfabetoj kaj duonanalfabetoj. Tio montras, ke la nivelo de soci-ekonomia disvolviĝo multe influas kreskon de la loĝantaro kaj la malekvilibro de la tutlanda naskolimigo estas malfacile forigebla en mallonga tempo.

En la ĉinaj urboj en la 80-aj jaroj meznombro ĉiu neagrikultura geedza paro naskis malpli ol 1.5 infanojn, dume la kamparaj virinoj naskis ĉiu po 2.8 infanojn. Plejparto de la kamparaj virinoj havas du infanojn kaj iuj naskis eĉ 3 infanojn. Ĉinio estas lando, kies loĝantoj plejparte vivas en kamparo, tial la tutlandan naskadon kaj ĝian ŝanĝiĝon decidas ĉefe la kamparo.

En la granda orienta lando Ĉinio, kie la ekonomio kaj kulturo estas kompare postiĝintaj kaj disvolviĝas malekvilibre, solvi la problemon de la loĝantaro, nesolvitan de la historio, estas malfacilega laboro, tamen la spertoj montras, ke la laboro pri naskolimigo plenumiĝos sukcese kaj tiu komplika socia problemo iom post iom bone solviĝos, se nur oni faras konstantan klopodon kaj levas la konscion de la popolamaso pri la neceseco kaj grava signifo de naskolimigo, kombinate ĝin kun solvo de la aktualaj problemoj de la popolamaso. ■

Mirinda kap-akupunkturo

de SUN GUOLIANG kaj LI XINCHAO

PRO sekvaĵo de cerba hemoragio antaŭ 12 jaroj libana s-ino Rose suferis de paralizo de la dekstraj membroj kaj ne povis mem iri. Ŝi konsultis proksimume cent kuracistojn, sed ne ricevis rimarkindan kuracefikon. Akompanate de sia edzo, ŝi veturis al Ĉinio por peti helpon de la Kap-akupunktura Instituto de la Subprovinco Yun-cheng, Shanxi-provinco. Jiao Shunfa, estro de la instituto kaj prof.-kuracisto, faris al ŝi kap-akupunkturon. Post unufoja akupunkturo, ŝi jam povis mem stari, piediri kaj supren kaj malsupren iri laŭ ŝtuparo. En plena ekscitiĝo ŝi ne sciis, kiel esprimi sian dankon al la kuracisto kaj ripetis nur unu vorton: "Mirinde! Mirinde!" Ankaŭ Jiao ĝojis pro la boniĝo de ŝia sanstato, tamen li ne opiniis la kuracefikon neatendita, ĉar ekde 1970 li jam akupunkturis pli ol 300 000 paralizulojn de encefalopatio. Liaj pacientoj venis de Usono, Kanado, Sri-Lankao k.a. Lia kuracado efikis al 96.7% de la akupunkturitaj, el kiuj 44.6% komplete resaniĝis.

Antaŭ nelonge ni veturis al Shanxi kaj vizitis la 52-jaran Jiao, kreinton de kap-akupunktura terapio kaj modelan higienan laboranton de la tuta lando.

Jiao diris al ni, ke li ekokupiĝis pri medicinaj aferoj en la mezo de la 50-aj jaroj. Li studis kelkajn jarojn en la nervologia fakto de la hospitalo sub la Shanxi-a Medicina Instituto kaj tie li ellernis la neŭrokirurgiajn operaciojn kiaj la krani-cerba kaj cerebra angiografio. Li havigis al si certajn sciojn

ankaŭ en neŭrologio kaj ĉin-medicina akupunkturo kaj mokso. En la 60-aj jaroj li konis multajn neŭropatojn kiuj suferis de unuflanka paralizo, perdis kapablon paroli kaj kuŝis ĉiam en la lito. Ĝuste tiam li decidis en si studi akupunkturon kun espero, ke en iu tago li finos al la malsanuloj la dolorajn tagojn.

Ekde tiam Jiao Shunfa sisteme studis antikvajn ĉinajn medicinajn verkojn, kiaj *Huangdi Neijing*, *Akupunkturaj Jia kaj Yi* kaj *Akupunktura Kompletto*. Dank' al tio li kompare profunde posedis la teorion pri akupunkturo kaj komencis esplori pri la interrilatoj inter la teorio kaj internaj neŭrologiaj malsanoj. Laŭ tiu ĉi teorio proksime de ĉiu homa viscerero troviĝas akupunktura punkto, kiu estas ŝlosilo por kuraci la koncernan malsanon. Ekz. *zhongwan*, kiu troviĝas ĉe la haŭto plej proksime de stomako, estas ŝlosila akupunktura punkto por kuraci stomakajn malsanojn, kaj *tianshu* sur haŭto plej proksime de dika intesto. Same statas la akupunkturaj punktoj de perikardio, lieno, reno k.a.

De tio kuracisto Jiao konjektis, ke oni eble trovos sur krania haŭto idealan akupunkturitan punkton por kuraci cerban malsanon. Li scias, ke la cerebra kortekso estas dividita en plurajn regionojn, ĉiu el ili regas la koncernajn fiziologiajn funkciojn. Se tiel, ĉu estas ia interrilato inter la krania haŭto kaj cerebra kortekso? Antikvaj ĉinoj ne postlasis sperton. Ankaŭ la moderna medicino ne pritraktis tion. Jiao do decidis fari la praktikon persone por malfermi novan

vojon. Antaŭ spegulo li enpuŝis pinglojn delikatajn kiel haro en sian kranian haŭton por percepti la pikan senton kaj koni la idealan profundon de la akupunkturo kaj danĝeron. Dank' al multfoja praktikado, kuracisto Jiao finfine malkovris la kap-akupunkturadon en 1970. Foje en tiu jaro hemiplegiulo estis atakita de krizo. Jiao invitite kuracis lin. Jiao akupunkturis al li sur la krania haŭto, post tio la malsanulo, kiu ĉiam parolis malklare, ekparolis klare. Li dum longa tempo kuŝis en la lito, sed post akupunkturo li ellitiĝis kaj mem iris.

La kap-akupunkturo de kuracisto Jiao malfermis novan kampojon por kuraci internajn neŭrologiajn malsanojn. En 1971 la Higiena Buroo de Shanxi-provinco kaj la Higiena Ministerio de la ŝtato faris ekzamenon pri lia kap-akupunktura terapio kaj konkludis, ke ĝi estas nova frukto kombinita la ĉinan medicinon kun la okcidenta kaj nova invento de la kuracmetodo. En 1980 la Azia kaj Pacifika Higiena Organizo sub UN sankciis ĝin kaj decidis popularigi ĝin en la tuta mondo. De tiam senĉese venis pacientoj kaj fakuloj en- kaj eksterlandaj por esti kuracataj aŭ lerni la kap-akupunkturon.

De 1986 s-ro Jiao faris kuracadon kaj lekciojn en Usono, Kanado, Sri-Lankao kaj aliaj landoj. En Nov-Jorko iu s-ino, kiu suferis 3 jarojn de dekstra paralizo pro cerba embolozo, veturis per rulseĝo al li por peti kuracadon. Tiufoje apudestis usonaj kaj alilandaj fakuloj, kuracisto Jiao faris al ŝi kap-akupunkturon kaj post unufoja



Shunfa honorita de la Kirgiza Akademio de Sciencoj per ordeno

kuracado la pacientino stariĝis kaj mem ekiris. Iu apudstanta kuracisto admiris: “Niaj hospitaloj aplikis diversajn metodojn kaj prenis multajn medikamentojn al ŝi, sed ŝi resaniĝis malrapide. Sinjoro Jiao per pinglo ja akiris tiel mirindan efikon. Se mi tion ne vidus persone, mi neniel kredus.”

Nun s-ro Jiao estas konsilisto de la Akupunktura Asocio de Vankuvero, Kanado; profesoro de la Ĉina Instituto, Kanado; konsilisto de la Argentina Akupunktura Asocio; estro de la Ĉina Branĉo de la Internacia Vivlongiga kaj Konvaleska Instituto de Usono.

Por pluapaŝe disvastigi kaj apliki la kap-akupunkturajn terapiojn, ekde 1977 sinjoro Jiao okazigas trejnajn kursojn. Ĝis nun li jam gvidis 60 kursojn kun miloj da kursanoj ĉinaj kaj alilandaj. En 1985 la kap-akupunktura terapio inventita de Jiao Shunfa estis honorita per unuaranga scienc-esplora premio de la Higiena Ministerio de Ĉinio kaj en 1986 li ricevis premion de gravaj scienc-esploraj fruktoj de la Ŝtata Ĉin-medicina Administracio.

Dum nia vizito ni volis foti, kiel

Jiao faris kap-akupunkturajn al malsanulo, sed ne sukcesis, ĉar ni ankoraŭ ne ĝustigis la fokuson, li jam finis sian kuracado. Li ja faris la kap-akupunkturajn en momento. Ni devis atendi alian ŝancon. Jiao diris al ni, ke lia terapio nomiĝas ankaŭ rapida akupunkturo triflanka, t.e. rapida enpiko, rapida turno kaj rapida eltiro de la pinglo.

Atinginte sukcesojn pri la kap-akupunktura terapio, Jiao neniam kontentiĝis. Post plurjara studado li ekhavis sian apartan vidpunkton pri la tradicia ĉin-medicina teorio pri ĝinglŭo-oj. Li opinias, ke la ĝing-vojetoj priskribitaj en “*Neijing*”, ĉina klasika medicina verko, estas nervoj kaj sangvazoj kaj la akupunkturo faras kuracefikojn pere de la centra kaj periferia nervaj sistemoj, sed ne pere de aparta sistemo diferenca de la nervoj kaj sangvazoj, kiun ĝis nun oni ankoraŭ ne trovis. Kiun punkton oni akupunkturas, tion decidas la regulo pri la regado de la ganglio, sed ne la teorio “preni akupunkturajn punktojn laŭ la ĝinglŭo-vojetoj”. Por diri simple, la ĝinglŭo-oj en la okuloj de la antik-



Jiao Shunfa kuracas pacientojn.

vaj ĉinoj estas efektiva, videblaj kaj palpeblaj. Tio ja estas nervoj, sangvazoj k.a. kiujn oni bone konas hodiaŭ.

Tio estas brava kaj freŝa vidpunkto. Ĝia publikiĝo, samkiel naskiĝo de la kap-akupunktura terapio, vekis sensacion en la ĉina medicinista rondo. En la specialistaj eksperimentoj okazigitaj antaŭ nelonge la ĉeestantoj opiniis, ke la vidpunkto de Jiao estas hereda, sed ne banala, originala, sed ne senbaza. Ĝi estas valora en la klarigo de la esenco de ĝinglŭo-oj kaj ludas gravan rolon en la estonta esplorado pri akupunkturo.

Ja fariĝas pli kaj pli larĝa la vojo de Jiao Shunfa. ■

Dimanĉo en Daluo

Teksto de HU YUN

Fotoj de LIU SIGONG

DALUO estas urbeto ĉe landlimo en sudokcidenta Ĉinio. Ĝia bazaro en dimanĉo estas ne nur vigla, sed ankaŭ vaste konata, tial venas tien multaj aliprovincanoj. Ĝuste kiam mi intervjuis en Yunnan, mi speciale venis al Daluo por viziti ĝian bazaron.

Je la kvara horo de dimanĉo el ekster la fenestro alportiĝis bruo de homoj. Mi iris el la domo kaj vidis homojn moviĝantaj kelkope sur malluma strato. Mi rigardis antaŭen kaj vidis, ke sur la strato en la urbocentro jam montriĝis longa vico da standoj. Tiel frue jam troviĝis aĉetantoj. Same kiel mi, ili estis turistoj venintaj al la urbeto hieraŭ. En la lumo de poŝlampo ili elektis varojn kaj marĉandis kun vendantoj.

Mi iris sur la straton kaj vidis, ke iuj metis siajn varojn sur provizoran vendotablon, aliaj sur faldoliton kaj triaj, pli multaj, sur la teron. Ĉi tiuj sternis tukon sur la tero kaj metis siajn varojn sur ĝin. Ili sidis surtere kaj la aĉetantoj devis sidi sur la kalkanoj. Plejparto de la varoj estis kosmetikaĵoj, kaj krome ankaŭ vestoj, kulvualoj, babuŝoj kaj nacimalplimultaj metiartaĵoj. La kosmetikaĵoj en belaj kestetoj plejparte estis produktaĵoj de Singapuro kaj ilia prezo multe malpli alta ol tiu en la landinterno de Ĉinio. La vendantoj ĝenerale estis daj-aj virinoj kun hartubero en la malantaŭo de la kapo. Ili portis bluzon, longan tubojupon kaj tolan sakon. Malmultaj el ili povis paroli la hanan lingvon, tial kiam oni marĉandis kun ili, ili aŭ

kapneis aŭ respondis dajlingve. Tio sentigis al mi, ke mi venis en fremdan landon.


Fakte, Daluo mallonge distancas de birma vilaĝo. La popoloj de Ĉinio kaj Birmo ofte kontaktiĝas. Inter ili okazas ne nur negoco, sed ankaŭ geedziĝo. Tial boparenciĝis nemalmultaj landlimaj familioj de la du landoj. Daluo en la daj-alingvo signifas pramejon por ĉevalaj kaj bovaj karavanoj. Delonge ĝi estis pasejo al landoj de sudorienta Azio. Ofte birmaj kaj tajlandaj komercistoj venis tien por aĉeti salon kaj teon kaj ĉinaj komercistoj importis sapon, kerosenon kaj lignon el Birmo kaj Tajlando. Tia negoco iam ĉesis. Nur en 1985 restariĝis la landlima negoco kaj Daluo revigliĝis. Nuntempe la negoca valoro de Daluo estas malgranda. Unu el la kaŭzoj estas malfacila trafiko. Nemalmultaj el la tieaj vojoj estas teraj. En seka sezono la vojoj estas ireblaj, sed en pluva sezono ne. Ĉinio jam decidis kiel eble plej baldaŭ konstrui novan vojon inter Ĉinio kaj Birmo.

Elkrepuskiĝis. Daluo-rivero estis vualita de densa nebulo. Antaŭ la ligna domo de la landlima kontrolo stacio ĉe la rivero staris vico da birmaj virinoj petantaj la permeson eniri en Ĉinion. Por veni al la bazaro en Daluo, je la 2-3-a horo ili preparis la vojaĝon kaj piediris kelkdek kilometrojn da montvojo. Tamen mi ne legis lacon sur iliaj vizaĝoj. Ili neniom diferencas de la daj-aj virinoj en aspekto, kostumo k.a. — brunaj vizaĝoj, kavaj okuloj, bambua vekto en tuba formo kaj du pezaj korboj. Junulo de la kontrolo stacio diris al


mi: "Jam pli ol 60 homoj transiris la landlimon. Laŭ takso, hodiaŭ venos 200 personoj, malpli multe ol antaŭe." Parolante li faris registron, postulis pagon kaj donis paskarton. Birmaj virinoj, ricevinte paskarton, surŝultrigis la korbojn, rapidigis la paŝojn kaj tuj malaperis en matena nebulo.

Kiam la suno forpelis la nebulon, pli kaj pli multiĝis homoj sur la strato. Sur la strato ne tiom larĝa ekstaris jam tri vicoj da standoj, kio igis la straton preskaŭ neirebla. Nur tiam mi klare vidis, ke du stratoj estas interkrucitaj, ĉiu kun longo de malpli ol cent metroj. Sur unu strato oni vendis ĉefe ĉiutagajn bezonaĵojn kaj sur la alia — produktaĵojn agrikulturajn kaj neagrikulturajn. Tie troviĝis nemalmultaj lunĉejoj, kiuj vendis manĝaĵojn tuj post preparado. Tial super simplaj tabloj ĉiam naĝis vaporo. Tie la purpura glueca rizo estas bongusta. Laŭdire ĝi estas tonika por tiuj, al kiuj mankas sango, kaj la lokanoj ofte nutras per ĝi la akuŝintinojn. Mi miris, ke oni manĝas rizaĵon envolvitan en baŝoan folion. La folio spicas la rizaĵon per agrablaodoro. Poste mi vidis, ke multaj aliaj manĝaĵoj en la bazaro estas pakitaj per baŝoaj folioj.

Ĉe la tagmezo la suno fariĝis arda. La turistoj venintaj de malproksime demetis unu post alia sian kostumon kaj ŝvitante elpuŝiĝis el la bazaro, kun grandaj kaj malgrandaj pakajoj. Nur tiam ili ekkomprenis, kial Daluo vigliĝas tiel frue en dimanĉo. ■



Birmanoj revenantaj de la bazaro



En la bazaro

Aĉeto



Malprofundaĵo de maro — ora zono

Teksto de ZHENG ZHENJIE

Fotoj de LI CHUNGENG

TROVIGAS 3 230 000 hektaroj da malprofundaĵoj ĉe la 16 000-kilometra marbordo de Ĉinio. 1 130 000 hektaroj el ili jam estas ekspluatataj. En la restaj malprofundaĵoj oni plantas fragmitojn, spartinojn (*Spartina anglica*) k.a., aŭ bredas fiŝojn, salikokojn, kraĵojn, perlojn kaj konkulojn. La antaŭa senkreskaĵa malprofundaĵo jam fariĝis ora zono por disvolvo de ekonomio.

En Guangxi ĉe la sudorienta maro de Ĉinio, mi vidis, kiel oni tie utiligas la malprofundaĵojn. Tio prezentis al mi ĝeneralan bildon de malprofundaĵa ekspluatado ĉe la marbordaj regionoj de Ĉinio.

MARFUNDAJ MANGLARBAROJ

Mi informigis, ke laŭ la marbordo de Guangxi kreskas marfundaj manglarbaroj kun areo de 7 300 hektaroj. Atinginte la urbeton Shankou ĉe la urbo Beihai, mi tuj iris rigardi manglarbaron en Yingluo-golfo.

Ĉie vidigas post malfluso densaj manglarbaroj en la vasta malprofundaĵo. La arboj altas je 3-4 metroj, la plej altaj je 6 metroj. Iliaj kronoj estas verdaj kaj la radikoj kaj trunkoj ruĝaj. Starante sur digo, mi forte kunfrapis miajn ma-

nojn en direkto al manglarbaro, kaj blankaj gruoj kaj aliaj birdoj surprizite disflugis al la ĉielo. Mi demandis s-ron Ye, estron de Shankou-urbeto, kio estas la kluboformaj objektoj sur la arbobranĉoj. Li respondis, ke ili estas ĝermoj de manglarboj. La multiĝo de manglarboj estas interesa. Post maturiĝo de la fruktoj ĝermoj aperas sur la arboj. Post kiam la ĝermoj maturiĝas, ili kaj la fruktoj kune defalas en la teron kaj enradikiĝas en malprofundaĵo post kelkaj horoj. Se levigas tajdo, la fruktoj povas flosi du aŭ tri monatojn senmortaj. Se ili atingas malprofundaĵon, ili povas rapide ĝermi kaj enradikiĝi.

S-ro Ye diris al mi, ke la loĝantoj marborde de Guangxi ŝatas kulturi manglarbojn en malprofundaĵo, ĉar iliaj radikoj firme etendiĝantaj en ŝlimon protektas la digon. Tial oni nomas manglarbaron "kontraŭventa forsto". Krome, manglarbo estas firma kaj taŭga por fari meblojn kaj esti konstrumaterialo. El ĝia ŝelo oni povas fari medikamenton, ĝiaj folioj kaj floroj servas kiel naturnutraĵo por fiŝoj, al ĝia trunko povas aderi konkuloj...

SEZONO DE PERLOGREFTADO


Junio en Guangxi estas sezono

por grefti perlostrojn. En perlokulturejo apud la subdistrikto Yingpan de Hepu-gubernio mi vidis, ke gejunuloj, kiel lertaj kirurgoj, zorgeme malfermis firme kunpremitajn konkajn de perlostroj, metis malgrandan kojnon inter ili, poste per speciala tranĉileto eltranĉis "vojeton" kaj penetrigis internen laŭ la vojeton du rondajn perlonukleojn poluritajn el perlamoto kaj kovris la perlonukleojn per tegaĵo prenita el la korpo de viva perlostro. Tiujn operaciitajn "gravedajn" perlostrojn ili rapide metis en retkaĵojn kaj tuj poste la kaĵojn en malprofundaĵon. Oni diras, ke post du jaroj oni povas rikolti la perlojn.

Survoje de la perlokulturejo al la gubernia urbo Hepu, Xu Jiafu, mia akompananto kaj direktoro de la Marakvakultura Kompanio de la gubernio, konigis al mi, ke en la lastaj jaroj la gubernia registaro kuragiĝis fiŝistojn kaj perlokultureajn familiojn unuope aŭ kune funkciigi perlokulturejon, ke la famaj "sudaj perloj" povas disvolviĝi tie. En 1990 en la gubernio jam funkciis 133 perlokulturejoj kun jara produktokvanto de 768.5 kg. da fajnaj perloj, 40-oble kiom en 1982.

BREDADO DE OSTROJ

Tiutage mi invitite veturis per jakto al marakva kulturejo de la



Farado de kolĉenoj el perloj

urbo Qinzhou por rigardi ostrojn, kulturatajn en 1 100 hektaroj.

Mi rigardis foren en la jakto kaj vidis 7-8 ŝipojn ankritaj sur vasta maro. Starante sur la ŝipoj, fiŝistoj elakvigis ion per bambuaj instrumentoj. Proksimiĝinte, mi klare vidis, ke ili elakvigas grandajn kaj malgrandajn ŝtonpecojn kun multegaj maturaj ostroj. Iu fiŝisto malfermis kelkajn ostrokonkojn per pinto de falĉilo, kaj mi vidis en ili dikan karnon. Asista inĝeniero de la kulturejo Wei Kaifu diris al mi, ke meznombro 5 kilogramoj da ostroj tie kulturataj povas produkti 500 g. da karno.

“Ĉu ĉiuj ostroj estas tiamaniere kulturataj?”

“Ne. Tio estas nur unu el la metodoj. La de ni kulturataj ostroj plejparte adheras al cementaj stangoj.”

Vere, post unu kaj duona horoj, kiam tajdo malfluis, vidiĝis vicoj post vicoj da starantaj cementaj stangoj. Tiuj stangoj 45 cm. altaj estas faritaj el bambubetono. En

ĉiu hektaro da malprofundaĵo staras po 2000 tiaj stangoj, kaj ĉiu stango produktas pli ol 400 g. da ostrokarno.


S-ro Wei diris al mi ankaŭ, ke ostro estas adhera. Tuj kiam ĝi adheras al rifo, bambuo, ligno, konkono aŭ cementa stango, ĝi neniam povas mem forlasi ilin. Ĝi manĝas, spiras kaj ekskrementas pere de fermado kaj malfermado de la konkoj. Ĉiujare ĉirkaŭ la mezo de la kvina monato laŭ la luna kalendaro fiŝistoj transportas la stangojn al kolektejo de ostraj ovoĵoj kaj tie kulturas ilin dum 3-5 monatoj, poste la fiŝistoj metas la stangojn en kulturejon. Post 3 jaroj ili povas vendi la ostrojn. En la plejparto de la malprofundaĵoj de Beibu-golfo, kie okazas retajdo du kaj duonan horojn post malfluso, oni povas bredi ostrojn.

Kulturado de granoso (*Arca granosa*), alia specio de konkuloj, estas malsama ol tiu de ostro. En la 2.7-hektara malprofundaĵo de Yuwan-insulo de Fangcheng-gubernio, kulturata laŭkontrakte


de granosobredisto He Zongcai, mi vidis densajn truetojn post malfluso. Se oni fosas en trueto per mano, oni povas kapti granoson.

Por bone kulturati granosojn, He Zongcai kaj fiŝistoj de la vilaĝo elektis malprofundaĵojn ambaŭflanke de la interna golfo. Tie la marfluo estas facila kaj la tereno ebena, kaj krome tien enfluas malgranda kvanto da dolĉakvo. He diris, ke la denseco de granosokulturado kaj la normoj de la ovoĵoj estas difinitaj laŭ la kondiĉoj de la malprofundaĵo. Ĝenerale en 5-hektara malprofundaĵo oni semas 3-6 milionojn da ovoĵoj. Kiam la konkoj de la granosoj kreskas ĝis longeco de 2.5 cm. kaj ĉiu centoj da konkohavaj granosoj pezas ĉ. unu kg, tiam ili povas esti vendataj.

En 1990 ĉiu hektaro da malprofundaĵo laŭkontrakte kulturata de He Zongcai produktis 11250 kg. da granosoj, kun produktovaloro de 120000 juanoj kaj neta enspezo de 40000 juanoj. Li konstruis duetaĝan domon per 90000 juanoj. Sendube lia familio vivas sufiĉe riĉan vivon. ■



Ostroj kulturataj en malprofundaĵo



Bredado de perlostroj
en malprofundaĵo



Perlogreftado

Kaptado de bredataj ostroj en malprofundaĵo



Manglarbaro ĉe
Yingluo-golfo

ESP-NOVAĴOJ

● En majo de 1991, franca aktiva esperantistino Zorka Enizan estris karavanon al Ĉinio. Antaŭe ŝi jam vizitis Ĉinion kvin fojojn.

La 4-an de majo, ŝi kaj esperantisto s-ro Patrick intervidiĝis kun esperantistoj de la redakcio de EPC kaj Radio Pekino kaj studentoj de Esp-kurso de la Pekina Disaŭdiga Instituto.

Ĉi-foje ŝi konatiĝis kun kelkaj junuloj. Ŝi diris, ke vidinte la junajn esperantistojn de la ĉina E-movado, ŝi tre ĝojas. Ŝi diris: "Esperanto ankoraŭ ne estas popularigita en Francio, kion oni ne plibonigis, malgraŭ ke la francaj esperantistoj senĉese klopodas por diskonigi kaj disvastigi la lingvon."

La francaj gastoj respondis demandojn, pri kiuj interesiĝis la ĉinaj junaj esperantistoj.

● En la 2-a de aprilo, 1991, la Danlanda Ambasadato en Ĉinio, la Komisiono de Infana Literaturo de Anhui-provinco kaj la Hefei-a Biblioteko kune okazigis ekspozicion "Andersen kaj lia fabelmondo".

Ole Christoffersen, konsilanto de la ambasado, kaj lia edzino ĉeestis la inaŭguron. La fama verkisto, tradukisto kaj veterana esperantisto Chun-Chan Yeh estis invitite partopreni en la aktivado. Personuloj de la kultura rondo de Hefei-urbo kaj miloj da geknaboj vizitis la ekspozicion.

● La Orientĉina Normala Universitato en Ŝanhajo lastatempe okazigis serion da aktivadoj kun la nomo "Scienco kaj Esperanta Monato". Oni organizis kunsidojn de "Perspektivo de Psiko-konsultado kaj Esperanto" kaj "Esperanto en la Scienca kaj Teknika Kampoj" kaj okazigis unuafoje Esperantan deklamkonkurson de "Pokalo de Verda Stelo".

● Komence de aprilo, brita esperantistino f-ino Judith faris turisman vojaĝon en Jinan, Qufu kaj Tai'an de Shandong-provinco, kaj faris akademiajn interŝanĝojn kun la lokaj esperantistoj. Ŝi diris: "La vojaĝo en Shandong donis al mi profundan impreson. Reveninte al mia patrolando mi certe konigos al miaj esperantistoj Ĉinion kaj la E-movadon en Shandong kaj kuraĝigos esperantistojn de nia lando viziti Shandong."

● La Chengde-a Petrola Kolegio prenas Esperanton kiel nedevigan lernobjekton. Estos du porkomencantaj E-kursoj, ĉiu kun 50 lernantoj. Nur en tri tagoj pli ol 400 studentoj anoncis sin al la kursoj, inter ili estas triono da diplomigintoj.

● Esperanto eniris en universitaton en Brazilo. Post prezento de projekto pri instruado de Esperanto far Alagoana Asocio de Esperanto, la direktoro de Kultura Centro de UFAL (Universitato "Federa de Alagoas) permesas

ĝian instruadon flanke de fremdaj lingvoj. La kursoj estos nedevigaj kaj okazos en tri ŝtupoj: baza, daŭriga kaj supera. Estas planitaj duhoraj lecionoj dufoje semajne dum 4 monatoj por ĉiu ŝtupo. La unua klaso komenciĝos en aŭgusto ĉijare.

● En la urbo Maracaibo troviĝas la unua Esperanto-monumento de Venezuelo. Bedaŭrinde iu deliktema homo ŝtelis la metalan stelon de tiu monumento. Sendube oni devas fari novan stelon, sed Venezuelo E-Unuiĝo (VEU) ne havas sufiĉe da mono por fari tion. VEU petas monhelpon de alilandaj geesperantistoj. Oni povas tute senriske sendi perpoŝte bankbiletojn al Venezuelo. En tiu lando oni libere uzas usonan kaj okcidenteŭropan monon. Bv. sendu vian monhelpon al: Venezuela E-Unuiĝo, David G. Valecillos V, Calle 79 N-ro 3C-72, Maracaibo-4002, Venezuelo.

● La 13-a Kongreso de Brazilo Esperantista Junulara Organizo okazos de la 19-a ĝis la 26-a de januaro, 1992, en la urbo Barra do Garcas ĉe la mistera rivero Aragvaja, sub aŭspicio de la Urbo-Domoj de Barra do Garcas, Aragarcas kaj Torixoreu. Pliajn informojn petu de Tuka, prezidantino de BEJO, Caixa Postal 55030/BR-04799-SAOPAULO-SP, Tel.: (011) 247.2448.

S-ino Zorka Enizan (la dua de dekstre) kaj s-ro Patrick (la kvara de dekstre) renkontiĝas kun laborantoj de EPC-redakcio.



S-ro Ole Christoffersen (maldekstre) kaj s-ro Chun-Chan Yeh (meze) en la ekspozicio



Altira ĝenroserio pri antikva ĉefurbo

de JIAO SHANGYI

Antaŭ nelonge okazis en Pekino la Unua Konkurso de Ĉinaj Ĝenroj. Inter la verkoj de la unua premio estis ĝenroserio pri la antikva ĉefurbo Pekino, kiu altiris la atenton de la vizitantoj per sia aparta stilo en la plastiko, interesaj figuroj en diversaj aktivadoj kaj distingiĝa krudeca pentrado. La aŭtoro de la verkoj estas Ma Haifang.

Ma Haifang diris: "Super tiuj 12 pentraĵoj mi klinis min pli ol monaton kaj foruzis du stakojn da papero." La pentraĵoj ne povas komplete montri lian talenton, tamen ili pruvas, ke ili estis kristaliĝo de lia longatempa observado kaj pensado.

Li ekinteresiĝis pri ĝenro jam antaŭ dekelke da jaroj, kiam li studis en la Nacia Belarta Instituto en Pekino. En liaj skizokajeroj oni povas ofte vidi figurojn de plej ordinaraj laboruloj, ekzemple tranĉiloakrigisto, riparisto de feraĵoj k.a. Kiam li iris surstrate, lia atento facile falis sur ĉifoniston, kolportiston k.a. Li opiniis, ke tiuj personoj estas nemalhaveblaj por prezenti la originalan fizionomion de la antikva urbo, ke ili strikte kunligiĝas kun la historio, tradicioj, moroj, kutimoj kaj geomorfologio de la urbo. Malgraŭ snobeco por tre diversaj modaj specoj de belarto, li neniam ŝanĝiĝis en sia observemo. Kiam li preparis tiujn ĝenrojn, li tuj decidis bildigi tiujn plej ordinarajn homojn, kiujn li vidis sur stratoj. Sekve vendisto de akvomelono, vendisto de bakita batato, bicikloriparisto kaj barbiero en la ĝenroj konsistigis la scenojn de la ĉiutaga vivo de Pekino.

Li estas observema por la pentrado. Li diris, ke plejparto de la vendistoj de rostita surstanga ŝafaĵo vendas kun licenco, sed kelkaj el ili vendas sen permeso, sekve ili ĉiam montriĝas timemaj, ke ili estos punataj de impostistoj. Foje, por koni iun instrumenton de ŝuriparisto, li longe pririgardis ĉe iu ŝuriparisto, kio vekis ties suspekton.

Tamen lia pentrado ne estas limigita de la aktuala vivo. Li pentras ne en la maniero de sola skizado. Se oni rekte pentras la absorbitajn okulojn de birdo-amanto, kiu plezure pririgardas siajn birdojn en kaĝo, tio ne estas estetika. Li do pentris la lipojn iom antaŭenigitaj, kio artisme vivigis la mienon de la delektiĝanta birdo-amanto.

Ma Haifang pentras sur blonda papero, kaj

klare konturiĝas la kolorpecoj nigraj, blankaj kaj grizaj. La pentraĵoj montriĝas antikvecaj sen intenca malnovigado. Sed ili spiras modernan vivon. La pentraĵoj estis faritaj ne laŭ antikva tradicio, nek laŭ groteska modo.


Ĝuste tia estas la pentrostilo de Ma Haifang.




Ma Haifang en kaligrafado

Sukeraj homfiguroj blove faritaj






Stando de fruktoj



Birdo-amanto



Vent-radoj



Vendanto de surstangaj sukeritaj kratagruktoj

Rostado de surstanga ŝafajo



Novaj libroj de ĈEE en 1990

(Daŭrigo)

Ĉinaj Batalartoj, kompilita de Zhaohua. 18,2×20,5 cm., 140 p., USD 2,90.

La ĉina uŝuo estas konata kiel metodo de ĉinoj por sin defendi kaj ekzerci dum miloj da jaroj. Ĝi interesas pli kaj pli multajn alilandanojn, kaj ili deziras sin ekzerci per ĝi. La libro kun ĉarmaj bildoj konigas al niaj legantoj la tradician arton kaj ĝian ekzercadon.

Amuzaj Karikaturaj, kompilita de Peng Guoliang, tradukita de Dai Song'en. 18,5×17,2 cm., 20 p., USD 1,25.

En la libro vidiĝas humura karikaturo mondo. La blanka leporido estas naiva kaj saĝa, la granda luporuza kaj la granda pando honesta. Ili ĝoje vivas kune. Karikaturisto Peng Guoliang per humoraj pentraĵoj rakontas al infanetoj historiojn de la leporido, luporuza kaj pando.

La Tago de Baobao, kompilita de Zhang Meifen kaj Huang Biyun, tradukita de Dai Song'en. 18×20,5 cm., 20 p., USD 1,25.

La infana bildlibro per naiva figuro de infaneto konigas, kiel Baobao lernas, ludas kaj sportas en infanĝardeno, kun la celo kulturi ĝentilecon kaj amon al bestoj kaj ludiloj.

Bona Baobao, kompilita de He Yanrong, tradukita de Dai Song'en. 18×20,5 cm., 20 p., USD 1,25.

La infana bildlibro per aminda figuro de infano konigas al infanetoj, kio estas farinda kaj kio ne, kaj donas al ili rudimentajn sciojn pri etiketo kaj ĝentileco. Ĝi taŭgas por eduki infanetojn.

Mi Estu Patrino, kompilita de Wu Qi, ilustrita de He Yanrong, tradukita de Dai Song'en. 18×20,5 cm., 20 p., USD 1,25.

La bildlibro estas bona legaĵo por infanetoj, kiu donas al ili sciojn pri ĉiutaga vivo. Lanlan estas kiel patrino de tolpupo kaj helpas ĝin surmeti veston kaj ĉapon. Per la libro oni instruas infanetojn, kiel surmeti veston kaj ĉapon, por ke ili povu vivi memstare.

Ni Kune Ludu, kompilita de Ji Jiaxiu, ilustrita de



He Yanrong, tradukita de Dai Song'en. 18×20,5 cm., 20 p., USD 1,25.

La bildlibro rakontas la vivon de infaneto. Kun belaj bildoj, ĝi interesas infanojn kaj instruas ilin alte taksi unuigon kaj amikecon.

Esperanto-Ĉina Vortaro (dua eldono), kompilita de niaj laborantoj. 13,5×19 cm., 1 072 p., bind., USD 20,00.

La enhaviĉa vortaro estas reviziita kune de ĉefredaktoro Hongfan kaj la redakcio de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, surbaze de Esperanto-Ĉina Vortaro (unua eldono) eldonita de la eldonejo en 1987.

Ĝi estas la unua Esperanta vortaro eldonita de Ĉinio 70 jarojn post kiam Esperanto enkondukiĝis en Ĉinion. La vortprovizo estas plej granda, la teksto plej detale pritraktita kaj la aŭtoritato plej alta. Ĝi enhavas en si ĉirkaŭ 45 000 artikolojn, inter kiuj estas 18 000 radikvortoj kaj 27 000 kunmetaĵoj kaj derivaĵoj.

Al la vortaro aldoniĝas listoj de Neesperantaj Afiksoj kaj Vortelementoj, Esperanta Transskriba Sistemo por la Hanlingva Fonetiko kun Internacia Fonetiko-Alfabeto, Ĉefaj Ĉinaj Geografiaj Nomoj, Konciza Kronologia Tabelo de Ĉina Historio, Ĉinaj Nacioj kaj Baza Radikaro Oficiala.

Esperanto-Kurso por Memlernado (dua volumo), verkita de Laŭlum. 13×18,2 cm., 460 p., USD 4,00.

Aŭtoro Laŭlum, membro de la Akademio de Esperanto, okupiĝas per Esperanta tradukado kaj instruado de multaj jaroj.

La tekstoj legiĝas en Esperanto kaj la ĉina lingvo, la ekzercoj havas referencajn respondojn kaj la gramatikaj reguloj koncizajn klarigojn.

En la libro legiĝas rakonto, prozo kaj poemo kun belaj lingvaĵoj. La gramatika parto konsistas el vortfarado, tabelo de korelativoj, uzo de prepozicioj kaj vortordo.

AMUZOJ

Ĉinaj proverboj

Delikata maĉado,
Profunda studado.


Neakrigita glavo rustiĝas,
Mallernema homo postiĝas.

Ju pli spiko plenas, des pli ĝi
kliniĝas,
Ju pli multescia, des pli sciavida.

Posedita scio ne uzita,

Avo kaj nepo (Karikatur)

Ankaŭ mi povoscias pentri.



Kiel plugita tero ne prisemita.

“Bedaŭrinde, sinjorino, mi pensis, ke vi diris dankon.”

Humuraĵo

GENTILAJ VORTOJ

Iu sinjorino enaŭtiĝis kaj trovis neniun vakan sidlokon. Iu sinjoro stariĝis kaj cedis al ŝi sian sidlokon, sed la sinjorino tuj sidiĝis sen-vorte kaj senesprime. La sinjoro abrupte sin returnis kaj demandis:



“Kion vi diris, sinjorino?”

“Nenion, sinjoro.”

Tranĉi kukon


Vi povas tranĉi kvadratan kukon en kvar tute egalajn partojn en formo de kvadrato, rektangulo kaj triangulo laŭ la bildoj A, B, C. Ĉu vi povus tranĉi triangulan kukon ankaŭ en kvar tute egalajn partojn?

(Solvo trovebla en ĉi numero)



Kuri pladon per

si mem (Karikatur)




Kajta festivalo kun nova aspekto

Teksto de ZHANG QINGZHEN
Fotoj de WU XINHUA



La inaŭguro de la kajta festivalo

Membroj de la itala teamo flugigas kajton.




Kajto kun novjaraj bildoj

Pueblo de Usono ĝemeliĝis kun Weifang lastatempe. Jen ĝia estro vizitas la ekspozicion de ĉinaj kaj alilandaj kajtoj.



Alilanda kajto kaj ĉina kajto kun bildo de la antikva ĉina agronomo Jia Sixie

Kajto en formo de rafano, loka produktaĵo de Weifang



URBETO Weifang, situanta meze de Shandong-provinco, fariĝis ĉiam pli fama trans la landlimoj en la lastaj jaroj, ne nur pro siaj novjaraj bildoj kun densaj lokaj gustoj kaj interesa turismo, sed ankaŭ pro sia longhistoria kajtar-to kun speciala karaktero.

En aprilo, 1984, en Weifang okazis la Unua Internacia Kajta Festivalo, kio markis novajn interrilatojn inter la weifang-anoj kaj alilandaj popoloj, kaj donis al la loko favorajn kondiĉojn por disvolvi turismon kaj prosperigi ekonomion. En 1985, la registaro de Weifang difinis, ke la unua de aprilo estas la Internacia Kajta Festivalo de Weifang. De tiam ĉiujare okazas tie internacia kajta festivalo.

Weifang jam sukcese okazigis sep fojojn internacian kajtan festivalon, kio estis vaste laŭdata en kaj eksterlande. En aprilo de 1991 okazis tie la Oka Internacia Kajta Festivalo kun multe da novaj programeroj.

Ĉi-fojan festivalon partoprenis 22 eksterlandaj teamoj el 17 landoj kaj 30 enlandaj teamoj el Pekino, Liaoning, Fujian.

SUB LA SAMA LAZURA ĈIELO

Matenon de la unua de aprilo, sur la vasta placo norde de Weifang, svarmis kajtistoj de malsamaj haŭtokoloroj el kvin kontinentoj de la mondo. Ĉirkaŭe estis sennombraj rigardantoj. La kajtoj flugantaj en la aero sin prezentis diverskoloraj kaj malsamaspekte. Iuj kiel aglo jen soris, jen glisis, aliaj kiel longa drako balancis siajn kapon kaj voston, triaj kiel libelo sin amuzis super akvo, kvaraj flirtis kiel papilia paro.

Kajta paro en feniksa formo ŝvebanta en la aero estis farita de la kajta teamo de Hongkongo. Mi venis al ĝia teama flago kaj parolis kun Chen Huoguang, prezidanto de la Hongkong-a Internacia Kajta Asocio. S-ro Chen diris: "Niaj kajtoj estas freŝkoloraj kaj facile flugeblaj. En la lasta printempo ni estis ĉi tie. Ĉi-foje ni denove venis, tamen ni sentas ĉion freŝa kaj intima."

Kompare kun malpezaj feniksaj kajtoj, la agla kajto de la itala kajta teamo, longa je 12 metroj, aspektis tre peze kaj ridige. Ĝia antaŭa parto estis ligita per naŭ nilonaj ŝnuroj. Oni diris, ke ĝi bone flugas en vento de pli ol ses gradoj. Mi vidis, ke pli ol dek

homoj klopodis dudek minutojn, tamen ne sukcesis flugigi la kajton, kiu ĉiam falis teren je ekleviĝo. Ŝajnis, ke tiu ĉi gigantaĵo ne kutimiĝis al la ekzota medio. Tamen ĝiaj du posedantoj estis memfidaj pri ĝi. Pere de interpretisto unu el ili diris al mi: "Tiu ĉi kajto estas genie projektita, dum la flugado ĝi estas plena de aventuro kiel glisado kaj alpa skiado."

"Sub la sama ĉielo, sur la sama tero", tiuj vortoj estis presitaj sur sportaj vestoj portataj de la delegitoj de la Uson-ĉina Amikeca Asocio de orienta Usono. Ili flugigis kajton kun abstraktaj bildoj de pingvino, polpo k.a., kiu simbolicas pacon kaj amikecon. Mi venis al maljuna delegito kaj demandis, ĉu ili havas certecon gajni la premion en la amikeca konkurso de "Pokalo de Lazura Ĉielo". Li respondis: "Flugigante kune kun multaj alilandaj amikoj kajtojn, kiuj servas kiel amikeca peranto, sub la sama ĉielo ni sentas nin plezuraj kaj havas ankaŭ esperon akiri premion."

Mian atenton altiris granda draka kajto, kun tirŝnuro longa je 100 metroj, flugigita de ĉino kaj japano. Tiu japano estis s-ro Motegi Masaaki, vicprezidanto de la Internacia Kajta Federacio kaj prezidanto de la Japana Kajta

Kajto en formo de gruo



Reprezentantoj de la Usona-ĉina Amikeca Asocio flugigas kajton.



Asocio, kaj la ĉino estis s-ro Kang Baozhong, fama kajtisto de Weifang. Ili ambaŭ estis 52-jaraj, naskiĝis en sama monato kaj flugigis kajtojn ĉ. 40 jarojn. S-ro Motegi Masaaki diris al mi: "Weifang estas inda je la nomo de kajta urbo, pli kaj pli altiĝis la nivelo de la internacia kajta festivalo." Post momenta meditado li daŭre diris: "Ĉinio okazigis la Unuan Tutlandan Kajtan Konkurson kaj envicigis kajtadon en sportojn, kio multe ĝojigas nin. Ni, novaj kaj malnovaj kajtistoj, varbos pli multe da homoj al kajtado por fari la kajtojn senditoj de amikeco, la monda paco kaj progreso."

Posttagmeze de la dua de aprilo, antaŭ la Weifang-a Kajta Muzeo la organizanto premiis 19 teamojn el Usono, Aŭstralio, Francio, Hindio, tiun de la urbo Weifang k.a.

RIMARKINDAJ PRODUKTAJAJ KAJTOJ

Sur la kajtoflugiga placo la spektantoj kun granda intereso rigardis produktaĵajn kajtojn faritajn en kombino de tradicia tekniko kaj nova tekniko elspiranta la nunan vivon. La entreprenoj flugigis sur la placo la kajtojn faritajn laŭ formoj de bonkvalitaj produktaĵoj.

Plej bone flugis la kajto farita de la Jingyang-a Vina Fabriko. Ĝi estis 1.4 metrojn alta kaj 2.3 metrojn larĝa, kun rubando longa je 20 metroj. Ĝia meza parto estis en formo de vina skatolo. Ĝiaj du flugiloj estis el la bildoj de vinbotelo. La kajto, farita de la Fosforsterka Fabriko de Weifang, estis en formo de fruktoplana arbo, ĉe kies radikoj estis bildoj de diversaj sterkoj bezonataj de fruktujo. La flugiganto enmanigis al mi teleskopon por ke mi klare vidu la kajton kaj konigis al mi la sciojn pri diversaj kemisterkoj. Iuj fiksis la ŝnuron de kajto ĉe la stango de elektraĵ fadenoj kaj sidis kvazaŭ

antaŭ televidilo por rigardi, kiel iliaj produktaĵoj faras propagandon.

Oni ne simple rigardis tiujn kajtojn kiel propagandon de produktaĵoj, ĉar ili enhavis sencon kaj logikon de la vivo. Mi vidis, ke la kajto kun nomo de bomba fuzaviadilo, farita de la Tria Lan-tekstila Fabriko de Weifang, aspektis kiel milda kolombo, dum la kajto Blua Aglo, farita de la Tria Tekstila Fabriko de Weifang, sin montris kiel bomba aviadilo. La kajto Manto Kaptanta Cikadon, farita de la proviza kooperativo de Weifang, prezentis humuron pri konkurenco. Kiam la manto estis tuj kaptonta la cikadon, duhirunda kajto subite atakis la mantan kajton kaj kune kun la lasta falis malsupren, kio eksplodigis ridegon de la spektantoj.

Post 1.5-taga konkurso oni premiis 50 kajtojn plej grandajn, plej malgrandajn, plej longajn, plej belajn, plej origine projektitajn kaj plej alte flugantajn, kaj 15 plej bonajn produktaĵajn kajtojn el 300 kajtoj.

FIŜHOKA KAJTADO

Ĉi-foja fiŝhoka kajtado estis interesplena sporto, kiu estis de longe perdita antikva kajtado. Oni fiksis fiŝhokojn sur la vosto aŭ tirŝnuro de kajto kaj regas la kajton tiom alta, ke la hokoj restu en akvo. Kiam fiŝo estas hokita, oni flugigas la kajton supren kaj tiras la fadenon por preni la fiŝon de sur la fiŝhoko. Oni juĝas sukcesintojn laŭ la pezo de la kaptitaj fiŝoj. La konkurson partoprenis 30 kajtaĵ teamoj el la tuta lando.

Mi rigardis la fiŝhokan kajtadon en fiŝbredejo ĉe la antaŭurbo de Weifang. Dum la streĉa konkurso, Yang Jinxia, sportistino de la teamo de Yantai, per la kajto disdonita de la konkursa organizanto la unua sukcese hokis karpon pezan je 0.6 kilogramo. Je

kvardek post la dua, posttagmeze, kiam ŝia kajto leviĝis ĝis la alto de 400 metroj, ŝi refoje sukcesis hoki karpon pezan je 0.55 kilogramo. Yang Jinxia estas kajtamatoro de Yantai, en la lasta jaro ŝi gajnis la trian premion en la konkurso de malgrandaj kajtoj kun malpezaj flugiloj.

Post du-taga konkurado, la teamo de Nankino gajnis la unuan premion de kolektivo per la totala pezo de 26.75 kilogramoj kaj la teamo de Shandong-provinco la duan.


WEIFANG, GAJNINTO DE LA ĈAMPIONEKO

Dum la okazigo de la internacia kajtoflugiga konkurso, sur la kajtoflugiga placo norde de Weifang okazis la Unua Tutlanda Kajtoflugiga Konkurso. Post okazigo de la sep kajtoflugigaj konkursoj la Fizikkultura kaj Sporta Komisiono de Ĉinio oficiale envicigis la tradician kajtoflugigon inter la sportajn konkursojn.

Sur la okcidenta konkursejo, la sportistoj streĉe konkuris. Je la startpafo, dekoj da diversformaj kajtoj samtempe leviĝis. Centmetra draka kajto skuis siajn antenojn kaj longan voston, kun la turnigantaj okuloj fiere paradis ĉiele. Giganta ora feniksa kajto, kun tremetantaj flugiloj kaj longa vosto, kantadis sur la blua ĉielo. La prezentado de la kajtoj donis al la rigardantoj plezuron.


La Unua Tutlanda Kajtoflugiga Konkurso finiĝis. La teamo de Weifang gajnis la ĉampionecon.

La Internacia Kajta Festivalo finiĝis en amuza vespero, kiu konsistis el grandtipa vesta prezentado, muzikoj, kantoj, dancoj, magioj kaj akrobataĵoj. Ĉiam memorindaj estis la prezentitaj vestoj kun bildoj de kajto, kiuj donis la impreson de printempo kun svarme flugantaj birdoj. ■



Japano kajto ekfluganta

Juĝado de kajta arto



Alilandano prezentas en la inaŭguro.



PROJEKTO DE ĈINAJ HERBODROGOJ

La ĉinaj medicino kaj herbodrogoj havas prestiĝon en la mondo. Farmaciisto Cao Guangming kaj la de li gvidata Huadong-a Kompanio (grupo) pri Projekto de Ĉinaj Herbodrogoj faras utilan esploron por produkti ĉinajn herbodrogojn konforme al internaciaj normoj.

Krom administri gigantan entreprenan grupon, kiu kontaktiĝas kun ses provincoj kaj unu municipo, Cao Guangming funkcias ankaŭ kiel ĉefingeniero de la Herbodroga Kompanio de Anhui kaj konsilanto de la Ĉina Farmacia Asocio. Estas neniu alia ol li, kiu kreis la teorion pri la projekto.

La projekto de ĉinaj herbodrogoj estas sinteza projekto fari la koncernan produktadon moderna. Ĝia tasko estas analizi kaj resumi la leĝon de la herbodroga produktado kaj solvi teknikajn problemojn aperintajn en la transiro de tradicia manproduktado al moderna produktado, dank' al nuntempaj sciencoj kaj teknikoj.

Cao Guangming diris, ke la tradiciaj ĉinaj herbodrogoj estis mane prilaboritaj en apotekoj, kun multaj specoj kaj malgrandaj kvantoj. Kvankam nun oni produktas ĉinajn herbodrogojn grandkvante, tamen ne estas kompleta la granda parto de la teknikaj kaj ekzamenaj normoj de entrepreno. La ekipaĵoj estas postĝintaj kaj nekonformaj al la pozicio de la ĉinaj medicino kaj herbodrogoj en la mondo.

Kiel farmaciisto, Cao Guangming decidis ŝanĝi la staton. Li faris grandan esploron kaj teoriantalizon. En la lastaj jaroj li publikigis pli ol 30 disertadojn, inter kiuj estis "Prelegoj pri la Projekto de Ĉinaj Herbodrogoj en Serioj", "Nunaj Stato kaj Tendencoj de la Projektoj de Ĉinaj Herbodrogoj", "Farmacio en Perspektivo", "Strukturo de la Teknologio pri Produktado de Ĉinaj Herbodrogoj" k.a. Dank' al lia laboro, kiel speciala fako, la projekto de ĉinaj herbodrogoj jam havas rudimentan formon kaj vastan influon sur sciencan kaj produktan kampon de ĉinaj herbodrogoj.

Ĉinio havas pli ol 650 herbodrogajn entreprenojn. Cao Guangming planas kunlabori kun entreprenoj en diversaj provincoj kaj municipoj, por efektiviĝi la modernan produktadon de ĉinaj herbodrogoj.

PAPILIOJ EN TAIWAN-PROVINCO

La tropiko de la Kankro trapasas la mezon de Taiwan-provinco de Ĉinio. En Taiwan regas klimato malseka kaj musona de la tropika kaj subtropika zonoj. Tie somero estas longa, temperaturo alta kaj pluvo abunda. La jara meznombra temperaturo es-

tas inter 20-25°C. Ĉio ĉi estas taŭga por la kresko de papilioj. En la provinco vivas pli ol 400 specoj da papilioj, tial ĝi estas konata kiel fama kreskejo de papilioj en la mondo. En la lastaj jaroj kolektantoj kaj bredistoj de Taiwan plurfoje trovis rarajn specojn de papilioj, kio estis atentata de papiliaj amantoj en la mondo.

Ĉiujare Taiwan kulturis 25 ĝis 40 milionojn da papilioj kaj estas unu el la ĉefaj papilio-eksportaj regionoj en la mondo. La larĝvostaj papilionoj, violaj papilioj (*Zizira otis*) kaj kalimoj (*Kallima chinensis*) estas raraj en la mondo.

Larĝvostaj papilionoj estas grandaj kaj kreskas nur en Taiwan. Violaj papilioj kreskas en orienta Azio. Kvankam oni povas trovi ilin en Taiwan, tamen la nombro estas tre malgranda. Ili vivas nur en primitivaj arbaroj proksime de Jiaoban-monto kaj Lala-monto en norda Taiwan. Kalimo estas la plej granda el la papilioj en Taiwan-provinco. La disvolvigitaj flugiloj longas 12-15 centimetrojn. Ili estas kovritaj de flavaj skvametoj. La korpo de kalimo estas plena de buntaj strioj. Kiam ĝi flugas en la sunlumo, la korpo radias ĉarman brilon, kun ŝanĝiĝemaj koloroj. Tia papilio vivas sole en Lanyu de Taiwan, tial ĝi estas nomata "lumo de Lanyu" kaj havas ian signifon por esplori la geografian dislokiĝon de bestoj.

Pro la malvasteco de la regiono, kie vivas la supre diritaj papilioj, kaj pro senbrida kaptado dum multaj jaroj, malgrandiĝas ilia nombro tagon post tago.

ANTI-KVAJ FULMOFORIGAJ KONSTRUOJ

Estas miraklo, ke ankoraŭ sendifekte staras senombraj antikvaj konstruoj en Ĉinio. Oni nature demandas, kial ili evitis la fulmobaton.

Post esploro arkeologoj rimarkis, ke la antikvaj konstruoj estas konstruitaj el brikoj, ŝtono, mortero, ligno, ramita tero k.a., kiuj estas izolaj aŭ duonizolaj, kaj imunaj kontraŭ malsekeco, korodo kaj tertremo.

Antikvaj arkitektoj havis relative riĉajn geografian sciojn. Ili trafis elektis situon kaj ekologian medion por la konstruoj, aranĝis iliajn strukturojn kaj faris la koncernajn projektojn. Antaŭ la konstruado ili zorgis unue pri aerumo kaj sunlumo kaj due pri la natura fulmoevita kapablo. Tial la antikvaj konstruoj estas fulmoforigaj.

Historiaj dokumentoj montras, ke en la vivo la antikvaj ĉinoj akumulis riĉajn astronomiajn sciojn, precipe tiujn pri fulmotondro kaj elektro estigita de frotado. Ili tiam povis unuapaŝe distingi la naturajn konduktantojn disde izolilo, feromagnetajn materialojn disde malfortaj magnetaj materialoj. Tio metis teoriantalon por izolado kaj fulmoforigado.


Gimnastoj en konkurso

Fotoj de LIU SIGONG


Somere ĉi-jare okazis en Pekino la 4-a Internacia Gimnastika Konkurso "Ĉina Pokalo".


En la konkurso de 13 sportobranĉoj partoprenis 53 gimnastoj el Ĉinio, Sovetunio, Japanio, Rumanio, Germanio, Italio, Kanado, Jugoslavio, Aŭstralio, DPR Koreio, Sud-koreio, Taibei de Ĉinio kaj Hongkong. La ĉinaj gimnastoj gajnis 10 orajn medalojn, la sovetuniaj kaj rumanaj du kaj unu medalojn respektive.

Japana gimnastino Mari Kosuge




Ĉina gimnasto Huang Liping






Korea gimnastino Om Song Hui




Aūstralia gimnasto Tim Lees

Rumana gimnasto Adrian Gal



Sovetunia gimnasto Alexandre Svetlitchnyi



Por interkompreno

— Vizito de mezlernejoj kaj iliaj familioj

17-jara mezlernejo forlasis sian hejmon, ĉar lia patro vangof-rapis lin matene pro bagatelo. Li foriris de sia hejmo pro tio, ke neniu komprenas lin.

La tuta tago pasis. Trovinte, ke tio ne estas ŝerco, li revenis hejmen. Survoje al sia hejmo li subite trovis, ke li ekkomprenis siajn gepatrojn. Li skribis en la taglibro: "Vere intima estas la vojo al la hejmo." Atinginte la hejmon, antaŭ ĉio li faris memkritikon al siaj gepatroj kaj promesis ŝanĝi sian konduton en la estonteco kaj bone aŭskulti la konsilojn de la gepatroj.

Malakordo ofte troviĝas inter mezlernejoj kaj iliaj gepatroj. Kvankam similaj aferoj estas multaj, tamen la mezlernejoj, konataj de mi, plejparte ĉagreniĝas de la reciproka nekomprendado inter si kaj siaj gepatroj.

Nun prenu Nana, kiu havas bonajn interrilatojn kun sia patrino, kiel ekzemplon. Ŝi parolas al la patrino pri sia ĉagreno nur kiam ili kune iras surstrate por dimanĉa aĉeto, sed la temo estas limigita je malsukceso en ekzameno k.a. Ŝi neniam malkovras sian koron antaŭ la patrino.

Alia mezlernejo diris al mi: "La tuta familio kuniĝas nur ĉe la vespermango kaj tiam televid-stacioj elsendas brilajn programe-rojn. Mi ne povas imagi, kiel mi povus fini mian vespermangon sen televid-aparato."

La tria skribis en sia artikolo: "Sentivaj mezlernejoj povas kune kun siaj k-doĵ laŭvole elŝpruci sian ĝojon kaj malĝojon. Ili diligente lernas, eĉ interesiĝas

pri religio, sed ili plejparte estas silentaj en la hejmo."

Eble tio estas ordinara manifestiĝo de "fendego inter generacioj" aŭ "nekompreno" en la okuloj de la ĉinoj. Al tio dediĉas grandan atenton la gepatroj kaj instruistoj. Komprenoble, ili devas koni kaj kompreni la infanojn, sed kion la geknaboj devas fari?

Mezlernejanino Wang Kun diris, ke ŝi ĉiam sentas sin embarasata antaŭ la gepatroj. Foje ŝi volis mem lavi sian pluman mantelon, sed ŝia patrino lavis ĝin anstataŭ ŝi. Vidinte tion, ŝi volis diri "dankon", sed ŝi tion ne elbuŝigis. Fine ŝi decidis rekom-

penci sian patrino per alia maniero en la konvena ŝanco. Ŝi pensis, ke tion eble kaŭzis la memrespekto.

Multaj geknaboj renkontis similajn aferojn. Foje oni demandis Li Ning, kiom da jaroj havas ŝia patrino, sed tion ŝi neniel rememoris. Pro tio, ŝi multe konscienciproĉis sin, dirante: "Niaj gepatroj traktas nin per sia maniero kaj ni traktas ilin per la nia.

Ni ŝatas festi nian naskiĝtagon, sed malofte pripensas, kion ni devas oferi al niaj gepatroj. La infanoj kun forta memrespekto ne scias elturniĝi el embaraso antaŭ la gepatroj. Jen kial okazas malakordo."

Ĝuste kiel iu mezlernejo skribis en sia artikolo, "Ni mezlernejoj eniras en nian mondon, fermas la pordon, kuntiras la fenestrokurtenojn kaj tuj falas en kvietan staton por kompreni nin mem. Kiam la lernado estas malstreĉa, ni senĝene trinkas teon, ĝuas muzikon, faras tagnoton, skribas leteron al amikoj... Ĉio tio estas niaj propraj aferoj."

Mezlernejoj interesiĝas pri roboto.



Se oni diras “dankon”... Se oni esprimas gratulon al la patrino en ŝia naskiĝtago... tiele, ĉu la familio ne fariĝas iom pli intima?

Estas ĝojige, ke multaj el la mezlernejoj, kiujn mi konas, serioze pensas kaj klopodas por esti komprenataj. Chen Ning ja estas unu el ili. Li iam ĉagreniĝis pro malbona interkomprenado, sed poste li trovis, ke ne nur li bezonas esti komprenata, sed ankaŭ aliaj familianoj bezonas tion. Li lernas en ordinara mezlernejo kaj lia frato en profesia mezlernejo. Antaŭe li malestimis sian fraton, opiniante, ke la profesiaj mezlernejoj estas destinitaj por malsukcesintaj kandidatoj por altaj lernejoj. Sed poste, lia frato diplomitiĝis, eklaboris, estas salajrata kaj povas vivteni sin per sia propra forto, dum Chen Ning baldaŭ finos sian mezlernejanan vivon kaj estos ekzamenata por eniri en altan lernejon. “Eble mia sorto estas malpli bona ol tiu de mia frato,” li diris. Nur tiam li ekkonsciis, ke inter la homoj ne devas ekzisti ia malestimo. “Ni mezlernejoj estas tro romantikaj,” li diris. Ŝajnas, ke li komprenas sian fraton.

Tiuflanke Liu Wei havas pli profundan senton. Foje, reveninte hejmen de la bazar, lia patro, etvendisto, oni ne sciis pro kio, kver-

elis kun li kaj kolere vangofrapis lin. Komence li opiniis tion maljusta. Sed post kiam li sin okupis la tutan tagon pri vendado en la bazar, li tuj pardonis al sia patro la vangofrapon, turmentate de la laĝego.

Lia travivaĵo montris, ke mezlernejoj devas bone koni kaj kompreni siajn gepatrojn.

Iu knabino tiel imagis sian estontan hejmon: “Mi volas aĉeti apartamenton kun dormoĉambro, kabineto, salono, sporthalo, kuirejo kaj tualetejo. Mi deziras ankaŭ gastoĉambro...”

Liu Wei neniam pensis, ke en Ĉinio oni devas longe klopodi por unu ĉambro, atenteme kalkuli ĉiun moneron por oleo, salo, sojo, vinaĝo kaj aliaj ĉiutagaj bezonaĵoj, akumuli monon en pluraj jaroj por televidilo. Por lernado de la infanoj, por homaj interrilatoj k.a. oni devas cerbumadi kaj ĝuste tiujn problemojn devas solvi iliaj gepatroj.

Liu Wei diris: “Niaj gepatroj vivas en la socio kaj ni en la apartigita tavolo de ĝi. Pro la malsamaj aĝoj kaj travivaĵoj, ni kaj niaj gepatroj havas kompreneble malsamajn ideojn. Ni devas persone kontaktiĝi kun la socio kaj kompreni la aferojn sur la starpunkto de niaj gepatroj.”

Li pravas.

Zhang Zhen diris: “Vivante senzorgan vivon, ni, mezlernejoj, ofte faras al ni mem enuojn kaj tro postulas alies komprenon. Pri familiaj konfliktoj, ni ĉiam postulas, ke niaj gepatroj komprenu nin, sed malofte komprenas ilin.”

Chen Qing diris: “Fakte, la tiel nomata fendego inter generacioj estas nur probabla. Mezlernejoj ne volas, ke iliaj gepatroj transformu ilin kaj ili ne devas postuli, ke iliaj gepatroj ŝanĝu siajn ideojn. Jen la fendego inter generacioj. Tial, mezlernejoj havas pli grandan respondecon por la familiaj aferoj.”

Lin Lei, mezlernejanino de la 119-a Mezlernejo de Pekino, serioze, konkrete kaj ekzakte analizis la ĝeneralan psikon de nunaj mezlernejoj en sia artikolo:

“La hodiaŭaj mezlernejoj sentas pli subtile ol la antaŭaj kaj multaj el ili havas apartan estetikan vidpunkton kaj animstaton. Estas menciinde, ke tia sentimentalo naiva kaj nebuleca okazas nur ĉe mezlernejoj de certa aĝo. Estas bedaŭrinde, ke nemalmultaj homoj prenis tion por personeco alte taksata. Efektive, tio ne estas simpla elekto de karaktero. En la reala vivo tiu animstato estas malforta kaj malvigla. Ĉiutage ili vivas en sia mallarĝa spaco kun animo konfuzita kaj soleca, propra al la mezlernejoj... Tial, ili senkonscie ŝanĝas sian animstaton iom post iom, eĉ damaĝis sin mem kaj deprimis batalvolon. Tio montras, ke ili obstine forpuŝas kaj kontraŭstaras kulturon kaj finfine perdas la kuraĝon por aktive partopreni kaj disvolvi la vivon.”

Pripensu, ĉu ne de tio devenas iliaj konfliktoj kun la familio, aliaj ĉagrenoj kaj malĝojoj?

Fakte, ĉu gepatroj ĉu infanoj, ĉiuj devas aktive kompreni aliajn, perfektigi sin mem kaj preni sur sin pli da respondeco en la familio. Nur tiam la socio fariĝos pli bela.

Mezlernejanino Cai Bin (meze) kaj ŝiaj gepatroj



EKONOMIO

● Multe progresis la ĉina surmara savado en la lastaj jaroj. En la lastaj 5 jaroj surmaraj savistoj de Ĉinio savis 356-foje sur maroj kaj oceanoj, kaj pli ol 95 procentoj de la savoj estis sukcesaj. Krome, la ĉinaj savistoj elakvigis 111 dronintajn ŝipojn, kaj 99 procentoj de la elakvigoj estis sukcesaj. Ĉinio kontraktis kun 37 landoj pri oceana transportado, inkluzive de tiu pri surmara savado.

● Lancang-rivero estas granda rivero trafluanta la Sudokcidenton de Ĉinio kaj sudorientan Azion. Nun estas komencita la preparado de internacia navigado sur Lancang-rivero. Post kiam komenciĝos la navigado sur la rivero, ĝi fariĝos la plej mallonga akva vojo inter la Sudokcidento, precipe Yunnan-provinco de Ĉinio, kaj sudorienta Azio, kiu egalas nur al triono de la mara vojo.

KULTURO

● Aperis ĝis la fino de 1990 ĉiuj volumoj de "Kompleta Verkaro de Lenin" (nova eldono) kompilitaj kaj tradukitaj de la kompila kaj traduka buroo sub la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. La aperado daŭris 15 jarojn.

La "Kompleta Verkaro de Lenin" estas la plej ampleksa kolekto de verkoj de Lenin en la mondo. La kompleto konsistas el verkoj, korespondaĵoj kaj notoj, en 60 volumoj, kun 30 milionoj da ĉinaj ideogramoj. Ĝi entenas sume 9 289 dokumentojn (39 volumoj kaj 4 280 dokumentoj kolektiĝis en la unua eldono). La nove aldonitaj dokumentoj plejparte estis skribitaj de Lenin post la Oktobra Revolucio, kaj temas pri la partia kaj ekonomia konstruado, scienco, kulturo kaj eksteraj aferoj en la socialisma periodo. La nova eldono estas pli riĉa, pli preciza, pli aŭtentika kaj pli bele presita ol la unua.

● Ĉina junulo Wang Xianbao faris la plej grandan ventumilon de la mondo. La etendita ventumilo larĝas 4 metrojn kaj altas 2.3 metrojn. La ventumilo faldebla estas farita en tradicia metodo. Unu 2-metra kadrobastono kaj 26 maldikaj bastonoj konsistigas la framon de la ventumilo, dum ĝia ekrano estas farita el bonkvalita ligno el la Nordoriento de Ĉinio. La delikate gravurita ventumilo surhavas 9 oritajn

drakojn flugantajn, kaj blua kaj flava koloroj estas la ĉefaj por la fono de desegno. La ventumilo estis enskribita en la "Rekordoj de Guinness" de 1990.

SCIENCOJ KAJ TEKNIKOJ

● Ĉinio unuafoje sukcesis ekstrakti kalion el mara akvo. Serioze mankas al Ĉinio kalia salo kaj ĉiujare Ĉinio devas pagi grandan sumon da fremda valuto por importi kalion. Krome, sala sunumejo okupas grandan kvanton da tero kaj krome, la marakvo poluas la medion. La ekstraktado de kalio rekte el mara akvo forigas la mankon.

● En la fino de la pasinta jaro la Internacia Asteroida Centro publikigis la nomojn de nove trovitaj asteroidoj kaj la asteroido n-ro 3088 estas nomata "Pitoreska Ĉinio". Ĝi estas trovita de la observatorio Zijinshan en Nankino de Ĉinio.

ARKEOLOGIO

● Antaŭ nelonge la Ĉina Akademio de Sciencoj trovis fosilian ankilosaŭridon el la rokoj kolektitaj de ĉinaj kaj kanadaj paleontologoj. Tio estas grava eltrovo en la historio de dinosaŭra esploro de Ĉinio. Ankilosaŭro estis la lasta generacio de saŭroj. Ĝi longis, ĝenerale, 4-6 metrojn kaj iris per 4 piedoj. Ĝiaj verto kaj dorso surhavis karapacon, tial ĝi estas nomata ankaŭ tankosaŭro. Ĝi estis unu el la herbovoraj saŭroj vivantaj en kretaceo (antaŭ 135-65 milionoj da jaroj).

Estas la unua fojo, ke oni trovis en Ĉinio tiel kompletan fosilian ankilosaŭron. La fosilia ankilosaŭro, plej malgranda en la mondo, longas malpli ol 10 centimetrojn kaj ĝia kapo longas nur 2 centimetrojn.

● La Kolokvo pri Historio kaj Geografio de Ĉinio, kiu okazis antaŭ nelonge, raportis ke la mapo trovita en 1986 en tombo de Qin-dinastio (221-206 a.K.) ĉe Fangmatan de Tianshui, Gansu-provinco, Ĉinio, estas la plej frua kaj en Ĉinio kaj en la mondo. Ĝia eltrovo pruvis, ke antaŭ 2 000 jaroj la mapologio de Ĉinio avangardis en la mondo.

En la fosejo oni trovis sume 7 mapojn desegnitajn sur 4 lignaj tabuloj. Oni konstatis, ke la desegnado de la mapoj plenumiĝis 300 jarojn antaŭ Kristo. Sur la mapoj troviĝas 82 notoj pri loknomoj, riveroj, montoj kaj arbaroj. Estis mirinde, ke oni povas identigi multajn nunajn riverojn kaj valojn kun tiuj sur la mapoj.



Dujara Zheng Mengzhu, la unua tubinfano sur la ĉef-tero de Ĉinio

HIGIENO

● Ministerian ekspertizon trapasis lastatempe serio de popularaj krurprotezoj CT2000. Tiuspeca protezo funkcias bone kaj aspektas vera. Akceptinto de tia protezo povas ne nur iri, sed ankaŭ montgrimpri aŭ kuri. La kvalito povas sin kompari al tiu kun internacia avangarda nivelo en la 80-aj jaroj.

● En Ĉinio esplorado pri tubinfano estis komencita en 1987. Marte de 1988 naskiĝis la unua tubinfano sur la ĉeftero de Ĉinio. Ĝis nun naskiĝis jam 23 tubinfanoj sur la ĉeftero de Ĉinio.

SOCIA VIVO

● En la unua de majo 1991, ŝanĝiĝis la ceremonio de hiso kaj malhiso de la nacia flago sur Tian'anmen-placo. La ŝanĝo estis farita laŭ opinioj de civitanoj kaj elmigrintaj ĉinoj pri la antaŭaj flagostango kaj ceremonio. Estas 2 rimedoj por hiso de la flago: unu por festotago kaj la alia por ordinara tago. La festotaga ceremonio okazas en la 1-a, 11-a kaj 21-a tagoj de ĉiu monato. En la ceremonio la flago estas eskortata de soldatoj kaj akompanata de la muziko de la nacia himno ludata de orkestro. En ordinara tago la ceremonion akompanas muziko el sonbendo. Kiam oni hisas la flagon, ĉiuj ĉinoj sur la placo devas demeti sian ĉapon kaj respekte stari vizaĝe al la flago.

● Nun Ĉinio faras intelektan enkondukon per 2 metodoj: inviti intelektajn elmigrintajn ĉinojn al teknika instruado kaj inviti superajn specialistojn. Laŭ la unua metodo Ĉinio invitas elmigrin-



Ceremonio de hiso de nacia flago sur Tian'anmen-placo

tajn ĉinojn, kiuj ricevis superan edukadon eksterlande, kontribui al la patrio per scioj, kondiĉe ke la kosto por ir-reira vojaĝo kaj la subvencio por ilia vivo estas pagitaj de la Disvolviva Programo de UN. De 1980 pli ol mil specialistoj-elmigrintoj estis invititaj. En 1985 Ĉinio komencis inviti alilandajn emeritajn fakulojn. Ili laboras en ĉ. cent fakoj pri industrio, energio, agrikulturo, telekomuniko, mediprotekto, arkitekturo k.a. Antaŭ nelonge la Disvolviva Programo de UN kaj Ĉinio subskribis la triaperiodan kontrakton, kiu postulas 4.5 milionojn da usonaj dolaroj. Ĝis nun inter la membrandoj de UN nur Ĉinio alprenis tiujn 2 metodojn.

● La 4-an de majo 8 000 arbogardistoj kaj laboristoj de la Granda Xing'an-montaro de Heilongjiang-provinco batalis kontraŭ incendio en arbaro 24 horojn kaj fine estingis ĝin. Dank' al ĝustatempa ago, la incendio estis estingita 10 metrojn for de loĝloko kaj neniu mortis en la incendio.

Pacaj senditoj en Quanzhou (II)

VIZITO AL LA SANKTAJ TOMBOJ

En la Sanktaj Tomboj sur Lingshan-monto de la orienta antaŭurbo de Quanzhou ripozas du disĉiploj de Mahometo. La tomboj estas la plej malnovaj historiaj restaĵoj de islamo en la Oriento. En la jaroj 618-626 Mahometo sendis siajn du disĉiplojn disvastigi religion en Quanzhou. Ili estis bonvenigataj de la tieaj popolanoj. Post kiam ili mortis, oni lukse enterigis ilin sur Lingshan-monto kaj nomis la tombojn "Sanktaj Tomboj". Nun la tomboj estas konataj kiel gravaj historiaj restaĵoj pri la kontakto de Quanzhou kun aliaj landoj kaj pri la disvastigo de islamo.

Unu el la gravaj aktivadoj de la esplorgrupo estis viziti la Sanktajn Tombojn sur Lingshan-monto. Sur la monto la tomboj kuŝas unu apud la alia, kun kovrilo gravurita el granito. Super

Grupanoj ĉe la vidindaĵo "Jada globo skuiĝanta en vento"

ili estas ŝtona kiosko. Post ili alroĉiĝas al la monto U-forma portiko ĉirkaŭ la ĉambroj por la ĉerkoj. Interne de la portiko staras 5 diversadinastiaj steleoj, kaj la meza havas historion de 600 jaroj. Sur ĝi legiĝas arabalingva surskribo pri la faroj de la disĉiploj. Islamanoj de la esplorgrupo pie genuiĝis antaŭ la tomboj. Pakistana islamano diris: "Mi ege dankas pro sufiĉe bona konservado de la tomboj. En la pasinteco la ĉina registaro permesis disvastigi diversajn religiojn en Ĉinio. Nun ĝi montras al ni la historiajn restaĵojn pri araboj en Quanzhou. Pro granda ĝojo mi preĝis ĉi tie."

Apud la tomboj kuŝas ŝtono. Ĝi kvazaŭ skuiĝas, kiam blovas vento. Franca fakulo, helpe de ĉiĉerono, trovis taŭgan apogpunkton kaj forte ekpuŝis la ŝtonon, ke ĝi skuiĝis, kaj tio vekis aplaŭdon. Oni nomas la ŝtonon "Jada Globo Skuiĝanta en Vento". Ĝi estas vidindaĵo de Quan-


zhou kaj montras la mirindan kreivon de la naturo.

EN LA VILAĜO DE HUI-OJ

Hui-oj, kiel nacimalplimultanoj, loĝas plej dise en Ĉinio. Ili loĝas ĉefe en nordokcidenta Ĉinio kaj formiĝis post la longtempa kunvivado de han-oj kun persoj kaj araboj, migrintaj el centra Azio laŭ la kontinenta Silka Vojo, sed la hui-oj en Quanzhou de Fujian-provinco formiĝis post la longtempa miksedziĝo de han-oj kun islamanoj, venintaj el centra Azio kaj aliaj lokoj laŭ la mara Silka Vojo.

En la urbeto Chendai de Jinjiang-gubernio sub Quanzhou vivas ĉ. 17000 posteuloj de araboj. Kiam la esplorgrupo atingis Chendai, tieaj islamanoj en 1-kilometra vico bonvenigis la grupanojn. En tamburado ili dancis kaj kantis por bonvenigi diverslandajn gastojn, precipe la islamanojn el arabaj landoj. Kiam la membroj de la esplor-

Grupanoj antaŭ la tomboj de Ding-familio



PACAJ SENDITOJ EN QUANZHOU (II)

grupo kaj la gastigantoj man-premis kaj ĉirkaŭprenis sin reciproke, multaj maljunaj huj-oj kun blanka ĉapo sur la kapo emociiĝis ĝis larmoj.

Chendai estas la unua “urbeto kun enspezo de 100 milionoj da juanoj” de Fujian-provinco. Tie oni vivas riĉan vivon. Tamen moroj de la loĝantoj pli interesis la grupanojn. Fakuloj de la grupo vizitis la huj-naciecan templon de familio Ding en Chendai. Laŭmore, huj-oj ne starigas templon por kulti siajn prapatrojn, sed huj-oj de familio Ding longtempe vivis kun han-oj kaj estis profunde influitaj de iliaj moroj, tial ili starigis templon kaj havas kultan ceremonion kiel han-oj.

La islamaj fakuloj de la grupo vidis tie multajn islamajn historiajn restaĵojn. Gustumante kukojn en la ripozĉambro apud la templo, ili interparolis kun lokaj islamanoj en aparta intimeco. Ĉe la adiaŭo ili donacis koranon al la gastigantoj.

SURROKAJ GRAVURAĴOJ SUR JIURI-MONTO

La nomita monto, fama en Quanzhou, situas en ĝia okcidenta antaŭurbo. Suprenirinte laŭ la ŝtuparo, mi atingis la okcidentan terason de la monto. Tie mi vidis multajn ruĝajn surskribojn gravuritajn sur krutaĵoj kaj rokoj ĉe la monttalo. Oni diris, ke sur tiu negranda montodeklivo troviĝas 75 gravuritaj rokoj, tial tie cirkulas la diro “ĉiu roko de la monto surhavas gravuritan skribon”. Tiuj ŝtonaj gravuraĵoj plejparte estas faritaj de oficistoj, instruistoj, eminentaj bonzoj kaj majstroj. 10 el la ŝtonaj gravuraĵoj temas pri preĝado pri favora vento por marŝipoj kaj prezentas la maran komercadon inter Ĉinio kaj aziaj kaj afrikaj landoj en la dinastioj Song kaj Yuan (960-1368). Ili estas atestoj por esplori la maran Silkan Vojon.

En Song-dinastio (960-1279) frekventis Quanzhou multaj ŝipoj el diversaj landoj de Azio kaj Afriko. Ili veturis surmare pere de vento. Ili alvenis laŭ sudokcidenta musono en printempo kaj aŭtuno kaj revenis laŭ nordorienta musono en aŭtuno kaj vintro. Por tio, antaŭ ol veturi sur maro, oni faris sur Jiuri-monto preĝadon pri favora vento, ke la dio de l' maro benu ilin per feliĉa vojaĝo. Laŭ noto, grandiozan preĝadon prezidis prefekto, ĝin partoprenis multaj registaraj oficistoj. Tiam tajdo flusis, centoj da ŝipoj kolektiĝis ĉe borde, flirtis flagoj, sonis tamburado, kaj la vico de koloraj palankenoj kaj ĉevalĉaroj longis plurajn km. Post preĝado oni donis grandan festenon, surgrimpis la monton por apreci pejzaĝon, notis la preĝadon kaj gravuris la noton sur roke.

Fininte la vizitadon de surrokaj gravuraĵoj, iu proponis gravuri sur rokmuro la aktivadon de la esplorgrupo en Quanzhou. La propono estis tuj aprobita. La magistrato de Quanzhou decidis elekti rokmuron sur Jiuri-monto kaj gravuri la nomojn de la diverslandaj fakuloj de la grupo kaj ĝian aktivadon sur ĝi por eterna memoro.

PREĜADO AL MARO LAŬ ANTIKVA MORO

La 19-an de februaro fervoraj Quanzhou-anoj okazigis solenan ceremonion de preĝado al maro laŭ antikva moro en Tianhou-templo de Quanzhou por adiaŭi la esplorgrupon, dezirante, ke Mazu benu la ŝipon “Paco” per feliĉa vojaĝo.

Mazu (960-987) estas la dio de l' maro, je kiu kredas tieaj popolanoj. Ŝia origina nomo estis Lin Mo. Ŝi naskiĝis en Meizhou

de Putian-gubernio, Fujian-provinco. Ŝi savis nemalmultajn fiŝistojn kaj varŝipojn dum la tuta vivo, tial ŝi estas titolita dio de l' maro post la morto. Ŝia pozicio fariĝis pli kaj pli alta pro la titolado far diversdinastiaj imperiestroj. Laŭdire, nun en diversaj lokoj de la mondo, kie loĝas ĉinoj, estas minimume mil temploj de Mazu. En la 23-a tago de la 3-a monato, ĉiujare, laŭ la luna kalendaro, la naskiĝtago de Mazu, interne kaj ekstere de la templo amasiĝas multe da homoj kaj fumas incensoj.

Tianhou-templo estas templo de Mazu kun plej alta normo. En la antikveco lokanoj okazigis tie la ceremonion de preĝado al maro printempe kaj aŭtune. Kiam la esplorgrupo atingis Tianhou-templo en pluveto, homoj kaj ĉevaloj jam staris ambaŭflanke de ĝi. Alivestitaj ĉinaj “oficistoj”, persaj “komercistoj” kaj “afrika virino” bonvenigis la gastojn.

La altaro estas antaŭ la statuo de Mazu, kun porko, ŝafo kaj aliaj manĝaĵoj kiel oferaĵoj. La prezidanto laŭte deklaris la ceremonion malfermita en la dialekto de suda Fujian. Tiam brudis tamburado, kaj la honora eskorto en antikvaj vestoj, alte tenante standardon de Tianhou-templo, eniris en la kunvenejon. Ilin sekvis “registaraj oficistoj” kaj “alilandaj komercistoj”. Ĉio ĉi iris laŭ la antikva ceremonio: La prezidanto ekbruligis la incenson, kultis la reĝon de la ĉielo kaj la sanktan patrinon Tianhou, voĉlegis kultan tekston kaj prezentis vinon, fruktojn kaj donacojn. Poste, oni ludis antikvan muzikon kaj dancis antikvan dancon. La solena ceremonio puŝis la aktivadon de la esplorgrupo al alta tajdo. Oni kore preĝis, ke la esplorgrupo havu feliĉan vojaĝon. ■

MODERNAJ VESTOJ



SOMERAJ VESTOJ

Foto de CAI HAIFENG

La vestoj portataj de la manekeno estas projektitaj de juna vestoprojektisto Liu Lu de la Ĉina Vesto-esplora Centro. La vestoj el moda silko kun floraĵoj sentigas vigecon kaj vivecon. La jupo karakteriziĝas per ĉina virina robo, dum la supra vesto vidiĝas la malstriktecon de eŭropa vesto. Ili estas faritaj el sama ŝtofo, kio montras la apartecon de modaj vestoj.

Gubernio de ĉina akrobatiko

Teksto de YI MING

Fotoj de CANG XUAN

Wuqiao-gubernio de Hebei-provinco estas konata kiel unu el la luliloj de ĉina akrobatiko. La akrobatiko de la gubernio havas longan historion. En ĉiuj 409 vilaĝoj de la gubernio estas akrobatoj. Post laboro aŭ manĝo, direktate de siaj gepatroj, junuloj kaj knaboj ekzercas sin per la arto, kun ŝovelilo, ĉareto, vekto, ombrelo, botelo, bovlo, drato, ŝnuro, biciklo kaj motorciklo kiel rekvizitoj. En la gubernio estas elbakitaj multe da eminentaj akrobatoj.

Nun en la gubernio estas 30 profesiaj akrobataj trupoj kaj ĉ. 100 duonprofesiaj. Ili ludis en diversaj partoj de Ĉinio. Iuj el ili turneis eĉ en aliaj landoj. En la pasintaj 30 jaroj la gubernio kulturis 1600 akrobatojn por pli ol 50 akrobataj trupoj de Ĉinio. Iuj el la akrobatoj funkcias kiel direktoroj aŭ trejnistoj de akrobataj trupoj kaj aliaj okupiĝas alilande pri akrobatiko.

Ekzercado



Prezentado sur draŝejo



En laborpaŭzo



Surdamuta knabo

Mia familio transloĝigis, sed mi ne ŝanĝis la lernejon, tial mi devis veturi per aŭtobuso al la lernejo anstataŭ piediri. Ĉe la fino de la linio estis lernejo de surdamutuloj, kaj ĉiutage mi renkontis kelke da surdamutaj lernantoj en veturado.

Mi miris pro ilia "parolado". Mi neniel povis kompreni la sonojn, kiujn ili faris. Ankaŭ iliajn gestojn mi ne komprenis. Tamen mi vidis iliajn mienojn de gajo kaj malgajo. Kelkiam ili grimacis unu al aliaj, sed mi ne povis kompreni, kion ili "diris".

Inter ili estis knabo malpli granda ol mi. Lia vizaĝo ronda, liaj okuloj brilaj kaj lia mieno ĉiam serena. Pasis multe da tempo, kaj mi komencis ŝerci kun li. Mi imitis liajn gestojn kaj mienon. Kaj tiam li montris koleron, sed li nenion "diris" kaj nur fiksas rigardon sur mi.

Iun tagon plumbaj nuboj kovris la ĉielon. Estis baldaŭ pluvonta. Post la lecionoj mi veturis hejmen kaj renkontis la knabon en aŭtobuso. Malantaŭ li staris kelke da pli grandaj surdamutaj lernantoj. Mi iam aŭdis, ke surdamutuloj estas venĝemaj, kaj min movis for de ili al la alia pordo de la aŭtobuso.

En la sekvanta haltejo mi devis elbusiĝi. Mi ŝovis la manon en la librosakon, sed ne trovis la monatan bileton. Mi diris al la konduktoro: "Onklo, mi forgesis kunporti la monatan bileton." "Do vi devas aĉeti bileton." Mi serĉadis en la librosako kaj trovis neniun cendon en ĝi. Ĝuste tiam mi aŭdis konatan



sonon de la knabo. Li iris al mi. Mi vidis, ke li tenas monon en la mano. Mi komprenis, ke li volas aĉeti por mi bileton. En ĝojo mi sentis ankaŭ penton, ke antaŭe mi malĝentile imitadis lin. Mi tre dankis lin, ke li liberigis min el embaraso. Mi volis diris al li dankon, sed ekpensis, ke li ne povas aŭdi. Mi volis gesti per la manoj, sed ne kapablis. Ĉe tiu momento la aŭtobuso atingis la haltejon kaj mi tuj eliris. Falis pluvego, kaj mi atendis en la pluvbudo de la haltejo.

Pluvis pli kaj pli forte. Evidente la pluvo daŭros longe. "Kiom longe mi atendas? Multe da hejmtaskoj atendas min. Ne, mi ne povas atendi plu." Ĝuste kiam mi estis elkuronta el la budo, mi estis haltigita de la muta knabo, kiu aĉetis por mi la bileton. Li fingre montris sian ombrelon, montris sin kaj min. Mi komprenis, ke li volas akompani min hejmen. Mi skuis la manon kaj diris: "Dankon, sed mi iru sola." Mi estis elpaŝonta, kaj li kaptis min forte je la brako. Mi skribis sur papero: "Kie vi loĝas?" Kaj li skribis sian adreson. Mi estis surprizita: Li devas trapasi ankoraŭ tri haltejojn por atingi sian hejmon.

Li akompanis min ĝis mia hejmo. Li ne eniris en la domon kaj tuj reiris al la haltejo.

Mi larmis kun dankemo, rigardante lian forirantan figuron. Mi decidis lerni gestojn de surdamutuloj, ĉar mi volis verŝi al li mian koron, ne nur simplan "dankon". ■

ABONTARIFO DE EPĈ POR 1991

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	16.00	26.00	36.00
Aŭstrio	ATS	215	360	500
Belgio	BEF	620	1020	1400
Germanio	DEM	32.00	54.00	76.00
Britio	GBP	9.50	15.00	21.00
Finnlando	FIM	72.00	117.00	163.00
Francio	FRF	102.00	165.00	225.00
Hispanio	ESP	1550	2500	3500
Italio	ITL	20600	33500	46500
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35.50	61.00	85.00
Nov-Zelando	NZD	21.70	36.00	50.00
Portugaliao	PTE	1550	2500	3500
Svisio	CHF	26.80	44.00	64.00
Usono	USD	15.50	26.00	36.00
Kanado	CAD	15.00	25.00	35.00
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	USD	11.50	18.50	26.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
	USD	7.80	12.50	17.50

Eleganta domo de baj-oj

Teksto de ZHANG MEIZHI

Fotoj de LIU SIGONG

TI AN ZHUANG -HOTELO antaŭe estis privata loĝejo. Kiel tipa konstruaĵo de baj-oj, ĝi lokiĝas en Xizhou-distrikto de Dali, Yunnan-provinco.

Rigardante ĝin de malproksime, mi vidis ĝian elegantan pordon, ĝian altan blankan muron kaj ĝian griztegolan tegmenton en baj-a stilo. Ĝi, kun duobla firsto kaj levitaj tegment-randoj, ornamigas per marmorpecoj kun belaj vejnoj kaj pejzaĝoj. La firstoj similas al flugantaj agloj. Sur ĉiu ekstremo de firsto troviĝas ligna draka kapo delikate skulptita.

Enirinte la korton de la hotelo, mi vidis unue frontan kaj flankajn domojn. Kontraŭ la fronta domo staras alta ekranmuro. Tio vidigas la rudimentan formon de loĝejo de baj-oj. Mi iris malantaŭen tra koridoro de iu flanko kaj atingis la postan korton ĉirkaŭitan de duetaĝaj domoj.

Mi iradis tien kaj reen en la korto kaj pririgardis la strukturon de la domo. Mi ne povis ne admiri la mirindan projekton de la arkitektoj kaj ilian eminentan arton. Ĉiuj pordoj estas lignoskulptitaj. Iuj el ili surhavas aĵurajn bildojn kaj aliaj — skulptaĵojn. Ankaŭ en tio enkorpiĝas frapanta trajto de baj-a konstruaĵo. Generale, ĉiu domo havas tian pordon el 6 klapoj. Kiam malvarmas, oni fermas la pordon, kaj kiam varmas, oni

ĝin malfermas. La koloro de tia pordo estas vermiljona aŭ ore flava.

Mi informiĝis, ke la ordinaraĵoj loĝdomoj de baj-oj ne estas tiaj, kia Tianzhuang-hotelo. Por rigardi ilin, mi veturis al Zhoucheng-vilaĝo.

Post duonhora aŭtoveturado mi alvenis al la vilaĝo. Ĝi havas ĉ. 1700 familiojn kun 8000 homoj. Ĝi estas granda ne nur en la sudokcidenta, sed ankaŭ en la tuta Ĉinio. Tie ĉiuj vilaĝanoj estas baj-oj, kiuj vivas generacio post generacio ĉe la piedo de la tutjare neĝkovrita Cangshan-monto kaj apud Erhailago. La tieaj antikvaj moroj ankaŭ konserviĝas hodiaŭ.

Nupta festeno

Ĉe la enirejo de la vilaĝo okulfrapas 2 frondoriĉaj arbegoj. Preskaŭ en ĉiuj ĉirkaŭaj vilaĝoj kreskas tiaj arboj. Ŝajnas, ke ili estas signo de la vilaĝoj. Ĉiuj gravaj kunvenoj de la loĝantoj okazas sub la arboj. Mia alveno koincidis kun vespera foiro en la vilaĝo. Oni svarmis ĉirkaŭ la arboj. Kiam mi alproksimiĝis al la loko, mi trovis, ke ĉiuj virinoj kaj eĉ infanoj en la homamaso portas baj-ajn vestojn. La virinoj portis ĉarman kaptukon kaj havis longan harligon volvitan sur la kapo. La harligo estis ĉirkaŭvolvita per roza silka fadeno, kies parto pendis ĉe flanko de la kapo. La maljunulinoj plejparte portis malhelkolorajn vestojn kaj la kna-






Pordo kaj fenestroj de la dua etaĝo




Baj-a maljunulo



Koloraj pordoskulptaĵoj

Korto kun tri domoj kaj unu ekranmuro





Pordo de loĝejo

binoj belkolorajn. Ĝenerale, ili portis pantalonon kaj blankan ĉemizon kun ruĝa veŝto ekstere kaj brodita antaŭtuko. Multaj virinoj portis infanon sur la dorso ĉirkaŭvolvitan per tuko. La patrinoj senĉese ion faris, dum la infanoj ludis aŭ dormis sur la dorso. La tuko, kiel belega metiartaĵo, surhavas broditajn florojn aŭ geometriajn figurojn.

En la vilaĝo mallarĝaj stratoj etendiĝas inter altaj muroj. Sur strato virinoj iris duope aŭ triope kaj la koloroj de iliaj vestoj heligis la grizan mondon. Ili portis en la brakoj blankajn ŝtofojn al tinkturejo en la vilaĝo. La tinkturita teksaĵo estas riĉa je loka gusto. En la tinkturejo oni unue devas ligi la desegnohavajn partojn de ŝtofo kaj poste tinkturi ĝin blua kaj blanka. Multaj virinoj okupiĝas pri tia tinkturado. En la vilaĝo kadukiĝis multe da domoj, tamen la porda komplekso estas eleganta. Mi malfermis pordon de korto kaj vidis, ke kontraŭ la pordo staras

ekranmuro kaj la dispozicio de la korto similas al tiu de Tianzhuang-hotelo. Io malsama kuŝas en tio, ke mankas nur unu flankadomo. La mastro diris al mi, ke la flankadomo estos konstruita, se eble. Nun li konstruis nur kuirejon. Ĝenerale, kuirejo lokigaĝas ĉe angulo de korto, ĉar la tiea angulĉambro povas servi kiel kuirejo. En la korto loĝas la familioj de fratoj, ĉiu en respektiva ĉambro flanke

de la korto. La angulĉambroj servas kiel iliaj kuirejoj.

Frumatene de la sekva tago post mia alveno al la vilaĝo, de tempo al tempo aŭdiĝis el la vilaĝo tamburado. Demandinte pri tio, mi sciigis, ke okazas geedziĝa ceremonio. Tiutage en la vilaĝo geedziĝis 4 paroj da gejunuloj. Mi tuj venis al la hejmo de novedzino Duan Shumei. Ĉe la pordo de la korto fumis du incensoj altaj je unu metro, ĉie sur la tero estis paperaj pecoj de krakfajraĵoj kaj en la korto svarmis akompanantoj de la novedzino. Ŝia doto konsistis el ŝrankoj, kestoj, televidilo, kudromaŝino, ŝuoj, litkovriloj kaj vestoj. Kelkaj knabinoj tualetigis la novedzinon. Ŝi havis 21 jarojn, kun bruneta haŭto kaj grandaj okuloj. Ŝi mienis timida. La knabinoj surmetis sur ŝin rozan robon, ornamis ŝian kapon per veluraj buloj kaj bidoj kaj pendigis spegulon ĉe ŝia brusto. Oni diris, ke la spegulo servas kiel talismano, kiu bone akompanos la novedzinon al

la hejmo de la novedzo kaj benos ŝin pri paca vivo.

Ĉe la tagmezo la novedzo venis al la hejmo de la novedzino. Salutinte ŝiajn gepatrojn, li, subtenante ŝin, eliris el la pordo. Ilin sekvis longa vico da akompanantoj. Ŝultre portante la doton, la junuloj jen iris antaŭen, jen haltis. Ili petoladis kun la novedzino, postulante ke ŝi ekbruligu cigaredon por ili kaj manĝu bombonon pendantan en la aero. Plej embarasis ŝin tio, ke ŝi kisu la novedzon. La novedzino sentis honton kaj ne volis fari tion, tiam la junuloj ĉesis iri antaŭen. Kiam okazis kiso, la junuloj eksplodis de ridego.


Tiutempe kolektiĝis en la hejmo de la novedzo multe da liaj amikoj. En la korto estis metitaj 20-kelkaj tabloj. Flanke de ĝi funkciis provizora kuirejo. Tuj kiam la novgeedzoj eniris la korton, komenciĝis la festeno. Sub sonora muziko kaj fajrajkrakado la novedzino venis antaŭ la pordon. Je la momento la gepatroj de la novedzo bruligis altajn incensojn kaj fajron kaj verŝis vinon sur ĝin. Tra la fajro la novedzino eniris en la pordon. Kaj poste la novgeedzoj adorkliniĝis al la ĉielo kaj tero, eniris la geedziĝan ĉambron kaj reciprokis tasojn kun vino. La vino estis dolĉa kaj pika. Por baj-oj piko signifas intimecon. Ju pli da piko, des pli da intimeco. Kaj la novgeedzoj kaj ĉiuj aliaj devis trinki tian vinon. Ĝuinte la vinon, mi ne povis diri, kiel ĝi gustas. Tamen mi sentis jam la antikvecon de la moro. Mi deziris al la novgeedzoj ĉiam feliĉan vivon.

Simila spektalo de la vilaĝo estas trabizi domon. En la korto, kie ĵus okazis ceremonio por trabizo, mi vidis, ke estas jam starigita ligna truso kun duobla rando. Sur la truso estis gluitaj multaj ruĝaj paperoj kun bonaŭguraj vortoj. La mastrino diris al mi, ke pli ol 800 homoj partoprenis en la ceremonio. Kompreneble, multe el la ceremonio estas mistera por mi. Bedaŭrinde mi ne vidis ĝin propraokule. ■



Domo en konstruado

Familio, kiu okazigas nupton



Vilaĝo de baj-oj ĉe la piedo de Cangshar-monto



Kafejoj en Parizo




Klientoj



Kafejo en vintro



En kafejo




En ĉiuj eŭropaj landoj troviĝas kafejoj. Ili estas nemankigeblaj por eŭropanoj, precipe por parizanoj.

Jam en 1643 aperis kafejo en Parizo. Je la fino de la 18-a jc. la nombro de kafejoj kreskis al 800. Hodiaŭ en la urbo servas proks. 1 200 kafejoj.

Kun la disvolviĝo de la socio multe ŝanĝiĝis la aspekto kaj skalo de la kafejoj. Plejparto de ili estas bele dekorita por allogi klientojn. Sed des pli allogaj estas tiuj kafejoj kun longa historio. Ilin vizitas nemalmultaj famaj verkistoj, artistoj kaj politikistoj. Tie ili diskutas pri politiko, literaturo kaj arto.

Kafejo en nokto





La Unua Tekstilejo de Jinan

La Unua Tekstilejo de Jinan kun longa historio estas la plej granda tekstilejo en Shandong-provinco. Nun en ĝi laboras 7 000 laboristoj.

Dank' al la bonaj ekipaĵoj kaj modernaj teknologioj la produktiveco de la fabriko leviĝas jaro post jaro. Nun la fabriko havas 91 560 spindelojn, 31 160 faden-tordajn spindelojn kaj 1 400 teksmaŝinojn por toloj 75 kolorojn larĝaj.

Ĝiaj ĉefaj produktaĵoj estas kotonaj fadenoj de 10-60C, inkl. de karditaj kaj kombitaj, tute kotonaj kaj kemifibraĵoj; toloj mezlongafibraĵoj kaj pure kotonaj, ebenaj toloj kaj maldelikataj dikaj keproj. Inter ili la tute kotonaj ebenaj toloj de 30 × 30C kaj koton-poliesteraj ebenaj toloj de 45 × 45C eksportigatas al okcidenteŭropaj landoj, ĉiujare 14 milionoj da metroj. Multaj produktaĵoj de la tekstilejo estas premiitaj de la lando.

Bonvenon al la tutmondaj komercistoj por mendo kaj negoco. La fabriko bone servos al ĉiuj vizitantoj.

Adreso: Linjia Qiao, Jinan, Beijiao, Ĉinio

Tel: 552044

Telegramo: 0230


Aplikoj:

La produktaĵo estas taŭga por ŝtala kuvo kun kapacito de 40-100 tunoj en kontinua muldado kaj matrica muldado. Ĝi povas regi la rapidecon de elfluo de fandita ŝtalo.

Teknikaj normoj:

- La kontura grandeco:
 - Alto: 267 mm
 - Larĝo: 450 mm
 - Profundo: 725 mm
- La interspaco inter la supra kaj malsupra glitiloj: ≤ 0.1 mm
- Glita longo de la malsupra glitilo: 160 mm \pm 2 mm
- Malvarm-stata momanto: ≤ 485 N°m
- La materio de briko: alumina-karbona kun fajrorezisto: $\geq 1750^{\circ}\text{C}$
- Premrezisto:
 - $\geq 500\text{kgf/cm}^2$ (por muldbuŝa briko)
 - $\geq 200-250\text{kgf/cm}^2$ (por baza briko)
- La procentaĵo de sukcesa verŝo: 98%

Glita valvo de tipo SHKF 40100P



Trajtoj:

1. La valvo kun dudimensiaj aperturoj faciligas regi la elfluon de fandita ŝtalo;
 2. La produkto estas projektita avangarde kaj bone farita. Ĝi estas facile manipulebla kaj sekura;
 3. Por ŝanĝi glitilon necesas 2-3-minuta manipulado de 1-2 homoj.
 4. Ĝi estas malgranda, malpeza, kaj ĉiuj ĝiaj pecoj estas munteblaj ekster kuvo.
 5. Ĝi ebligas kuvojn cirkuli rapide kaj fajro-rezistan materion esti malmulte konsumata.
- Grandeco de aperturo de muldbuŝa briko:
- Malgranda aperturo: $\phi 25-45$
 - Granda aperturo: $\phi 45-75$
- Mendo ĉe: Emei-a Glitivalva Fabriko de Jinan
- Adreso: Emeishan, Xijiao, Jinan, Shandong, Ĉinio
- Tel: 664261
- Telegramo: 1430

